


1988 majo
81a jaro
n-ro 989 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)
sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando

esperanto

ISSN 0014-0635



Bjalistoko: pola donaco al ni

Vi trovos,

numeron iusence jubilean, kvankam ne bakitan laŭ la kutima recepto. Tio ne nepre estas avantaĝo, kompreneble! Datrevenkukon tradician, priŝutitan de sukero kaj feste prezentitan, ni mem ĝuis ĉi tie en la Oficejo, la 28an de aprilo, kiam UEA okdekjariĝis. Tiel estis ankaŭ antaŭ 65 jaroj, kiam la Asocio solenis sian dekkvinjariĝon per la eldono de libreto plenŝtopita de laŭdoj por ĝia agado: *Universala Esperanto-Asocio en la juĝo de la esperantistoj*. Ties unuanime favora fervoro, eble pravigebla en la ankoraŭ juna movado de 1923, bedaŭrinde restas preskaŭ seninteresa hodiaŭ...

Pro ia-tia konsidero, ni ĉi-foje metas la akcenton sur aliajn ingrediencojn. Precipe konstruemon: tiu ambicio aldoni, renovigi, pliperfektigi, kiu ŝajnas la kerne komuna trajto de la diversaj reagoj sur paĝoj 83-88. Ili kompreneble ne reprezentas ian oficialan starpunkton (samkiel la redakcia apudapaĝa provo plu kirli la kukbataĵon), sed pli-malpli spegulas ĉiujn flankojn de la Asocio, pri kiuj oni pensis, maltrankviliĝis kaj finfine skribis al nia revuo lastatempe. Se vi trovas tie mankon de unu ingredienco kaj troon de alia, la rimedo korekti la recepton kuŝas unuavice ĉe vi...

Enhavo

- 81 Monda Esperanto-Centro en Bjalistoko: Monumento en kiu eblos studi kaj krei (prezento de la proponita labor-dokumento pri la Centro)
- 82 Kien UEA en sia naŭa jardeko? (enkonduko al diskuto) (Mark Fettes)
- 83 Organizaj strukturo kaj principaro: Ĉu redukti la veston aŭ pligrandigi la ŝtofon? (Gian Carlo Fighiera, Kees Ruig, Gary Mickle, Evert J. Ŭusink, Gottfried Hofstätter, Derek Roff)
- 85 Libroj: Verkado, eldonado, vendado: Kiaj ŝancoj ekzistas por stimuli nian librokulturon? (Donald J. Harlow, Enrique Kohei, Hernâni A. Resende, Behruz Atai, Dimitâr Hăĝiev, Marie-Louise Bodard); Ok jaroj da originala beletro (Isai Sumber)
- 87 Turismo kaj la Universalaj Kongresoj: Kiel plene profiti de nia vojaĝa potencialo? (L. De Bruyne, Marie Bartovská, Ganĉo Damjonov, Dimitâr Papazov, J. Giladi, A. Flandroy, Hans Bakker)
- 89 Instruado: Ni bezonas lernilojn por la motivita memlernanto (J. Karen)
- 91 Faka agado: Novaj ebloj ĉe la kooperativa movado (József Pál)
- 92 Universitata instruado: Budapeŝto pluiras kun du profesiuloj
- 93 Reagoj: Limigi la limigojn (Stefan MacGill); Lingvo de la scienco (Rob Keetlaer); Pli ĝuste... (Werner Bormann, Sven Ziegler); Ankoraŭ pri MPK... (Gary Mickle, P. Bo Larsen)
- 94 Nekrologoj
- 95 Kongresa Komunikado de la 73a UK en Roterdamo, Nederlando
- 96 Recenzo: *Nederlanda antologio*, red. Gerrit Berveling, Wouter Pilger kaj Willem Verloren van Themaat (Albert Goodheir)
Kalendaro (kompletigoj kaj detaligoj)
- 97 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 98 Loke—Fake; Esperanto en radio; Foliume (mallongaj novaĵoj)

La kovrilo

Bjalistoko, nia “adopta” urbo (vd. la apudan artikolon), trasuferis — same kiel la Movado mem — sufiĉe da krizoj de post la Zamenhofa epoko. Ĉiu flanko de la kovrila pakaĵo montras du vidaĵojn de la sama loko, unu modernan kaj unu de antaŭ cent jaroj. Ofte nur la stratoj restas samaj. Tamen la bjalistokanoj plu faras planojn por la estonteco, kun optimismo kaj espero. Rekomendinda modelo, kiun sekvas la internaj paĝoj.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉisuba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojević.

Direktoro de la Centra Oficejo en Roterdamo: Neil Salvesen

Estraro de UEA

Prezidanto (planado): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (financa evoluigo): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.

Vicprezidanto (kulturo): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.

Ĝenerala Sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (faka agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 muegy h.

Estrarano (administrado, kongresoj, financoj): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (interna agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Monumento en kiu eblos studi kaj krei

Laŭ la ideo unue lanĉita de s-ro Roman Malinowski, prezidanto de la pola parlamento, ekde la Jubilea Kongreso en Varsovio pasintjare oni konsideras starigon de Monda Esperanto-Centro "Zamenhof" en Bjalistoko, la urbo en kiu naskiĝis la iniciatinto de la Internacia Lingvo en la jaro 1859. S-ro Malinowski invitis Universalan Esperanto-Asocion esplori tiun ideon inter siaj membroj. Alvenis multaj proponoj rezulte de alvoko i.a. en la revuo Esperanto, kaj surbaze de ili kaj de diskutoj inter komitatanoj kaj estraranoj de la Asocio, estiĝis la ĉi-sekva labor-dokumento pri la celoj kaj formo de la estonta Centro.

Kiel kutime, kiam oni lanĉas ion novan — ĉi-foje ankaŭ grandan kaj ambician —, inter la movadanoj ne mankas entuziasmo pri la nova projekto, sed ĉeestas ankaŭ pesimismo kaj skeptika takso, ke la tuta plano estas tro grandioza por la eblecoj de la nuntempa Esperanto-movado. Nu, se Zamenhof mem estus tiel skeptika kaj malkuraĝa, la Unua Libro ankoraŭ ne estus aperinta! Cetere, ni ĉiu — dekmiloj, centmiloj, milionoj (kiom ajn da ni estas) — bezonas nur eron el tiu kuraĝo, kiun Zamenhof montris antaŭ cent jaroj.

En Pollando mem, kaj aparte en Bjalistoko, jam regas komplete entuziasmo pri la projekto (vd. p.61 de la lasta numero): kreiĝis tie Fondaĵo Zamenhof, kiu gvidos la laborojn; estas pretaj ĝiaj statuto kaj jura registriĝo;

okazis fine de februaro provizora kunsido de la estraro de tiu Fondaĵo; komence de junio okazos nova kunsido en ĉeesto de la prezidanto de UEA; pretas la unuaj arkitekturaĵoj skizoj; survojas la unua el la regulaj subvencioj de la pola Ministerio pri Kulturo...

Kiam, post deko da jaroj, la Centro ekfunkcios, ĝi fariĝos la plej grandioza monumento al Zamenhof. Ĝi ne estos marmora fridaĵo por admiri. Ĝi estos monumento, kiu pulsas kaj vivas, lernejo ĝi estos, studcentro, teatro, festivalejo, feriejo... — ĝi estos tio kion ni kapablos krei el ĝi. La ŝtato Pollando kaj la urbo Bjalistoko certe konstruos la Centron. Ni esperantistoj ricevos la konstruaĵojn kvazaŭ donace, por animi ilin, por spiri en ilin la vivon kaj tiun unikan internaciecon, kiun nur ni kapablas krei en la hodiaŭa mondo. Ni do ne skeptiku sed aliĝu al la pola entuziasmo, akceptu la donacon, kiun oni prezentas al ni kaj pruvu per nia engaĝiĝo, ke ni meritas ĝin. Memoru ankaŭ, ke Bjalistoko ne atendas multan monon de la esperantistaro (kvankam donacoj estas bonvenaj por speciala konto ĉe la CO), sed entuziasmon kaj plenan moralan apogon Bjalistoko atendas de ni kaj ja meritas.

Reagoj al la sekva dokumento estas bonvenaj ĉe la prezidanto de UEA aŭ la revuo, kaj estos okazo en Roterdamo plu kontribui viajn ideojn.

ORIENTIĜO

Celoj kaj publiko: La Centro servu kvin apartajn grupojn, nome: 1) Tiuj, kiuj volas lerni Esperanton, perfektigi sian Esperanton aŭ instrui ĝin; 2) tiuj, kiuj volas studi esperantologion, interlingvistikon kaj internacian lingvan komunikadon; 3) tiuj, kiuj volas partopreni la Esperanto-kulturon; 4) tiuj, kiuj volas studi aŭ informiĝi pri Zamenhof kaj liaj tempoj; 5) tiuj, kiuj volas lerni pri pola kulturo.

Rimedo kaj programoj: La Centro kontentigu la jenajn bezonojn de tiuj kvin grupoj laŭ la jenaj vojoj:

1) *Lernado de Esperanto kaj formado de instruistoj.* Homoj en tiu grupo venos el Pollando kaj el eksterlando. Ili havos je sia dispono longdaŭrajn studprogramojn, laŭ la tradicia universitata formo, kaj ankaŭ mallongdaŭrajn studprogramojn, ekzemple dumsemajnfinaĵojn, somerajn ktp. Laŭeble la programoj estu ligitaj al ŝtataj rajtigoj, ekz. instruistaj rajtigoj. La Centro ankaŭ okazigos distancajn programojn, utiligante la elsendkapablojn de la radiostudio de la Centro kaj aliajn rimedojn.

2) *Studado de esperantologio, interlingvistiko kaj internacia lingva komunikado.* La Centro proponos longdaŭrajn kaj mallongdaŭrajn studprogramojn pri tiuj temoj. Ĝi proponos la eblecon de restado en la Centro por fari bibliotekajn esplorojn, kaj ĝi organizos konferencojn pri la koncernaj temoj.

3) *Esperanto-kulturo.* La Centro organizos festivalojn de la Esperanto-kulturo, kun partopreno de polaj kaj eksterlandaj artistoj, konferencojn pri temoj kiuj rilatas al la Esperanto-kulturo, kaj renkontiĝojn de kulturaj

gvidantoj de la Esperanto-movado.

4) *Studado kaj informiĝo pri Zamenhof.* La Centro ebligos la studadon de la epoko de Zamenhof per faciligo de aliro al urbaj kaj regionaj arkivoj, per bibliotekaj esploroj, per vizitado de muzeo pri tiu ĉi temo, kaj per konferencoj kaj festivaloj.

5) *Pola kulturo.* La Centro ankaŭ ebligu studadon pri la polaj lingvo kaj kulturo, precipe por esperantistoj sed ankaŭ por aliaj eksterlandanoj. Okazu mallongdaŭraj studprogramoj kaj lingvaj kursoj, precipe dumsomeraĵoj.

FAKOJ KAJ STRUKTURO

1) **Esplorinstituto.** La kerno de la Centro estos fako kaj esplorinstituto pri la jenaj temoj: a) lingvaj aspektoj de internacia komunikado, inkluzive la novan mondan komunikan ordon kaj internacian lingvan politikon; b) esperantologio kaj interlingvistiko, kun emfazo interalie je la praktika utiligo de Esperanto; c) Esperanto-pedagogio en la kunteksto de lingvopedagogio ĝenerale; ĉ) moderna socia kaj kultura historio pola kaj bjalistoka. La Centro uzos la polan lingvon kaj Esperanton (kaj eventuale aliajn lingvojn laŭbezzone). Ĝi donos diplomojn pri pedagogio kaj pri fakaj esploroj komunikaj kaj lingvistikaj. Ĝi okazigos longdaŭrajn kursarojn en ambaŭ lingvoj. Ĝi proponos mallongajn kursojn por poloj kaj eksterlandanoj. Ĝi havu propran eldonserion fakan, propran eldonejon por instruiloj kaj lerniloj, radian kaj televidan fakon por pretigo kaj elsendo de instruprogramoj. Ĝi eventuale servu kiel centro por formulado de pola nacia lingva poli-

tiko. Ĝi havu programon de interŝanĝo de profesoroj kaj studentoj kun eksterlandaj universitatoj.

2) Biblioteko. La Centro starigos laŭeble plej kompletan bibliotekon pri la kvar supre menciitaj fakoj. Tiu biblioteko kunlaboru ankaŭ kun lokaj kaj naciaj kolektoj kaj estu laŭeble ligita al aliaj grandaj Esperanto-bibliotekoj.

3) Eldonejo. Tiu aperigu la supremenciitan serion.

4) Konferenca fako. La fako organizos a) studkonferencojn kaj seminariojn pri aspektoj de la supremenciitaj fakoj, b) turismajn renkontiĝojn, c) regionajn kulturajn renkontiĝojn, precipe Esperantajn, en kunlaboro kun la baltaj respublikoj kaj aliaj najbaraj ŝtatoj.

5) Muzeo pri Zamenhof kaj liaj tempoj. Tiu muzeo kovros kvar ĉefajn temojn: a) la vivo de Zamenhof kaj la frua Esperanto-movado, b) la urbo kaj regiono, c) grandaj sociaj kaj kulturaj fluoj de la epoko de Zamenhof, ĉ) la etna heredaĵo de Pollando kaj Bjalistoko, precipe la juda heredaĵo.

6) Radia kaj televida fako. Tiu fako pretigos stud- kaj instru-materialon, kaj eventuale povus esti ligita al naciaj elsendoretoj.

7) Hotelo kaj studenta domo. Tiu loko, kiu enhavu sportejojn, sideoĉambrojn ktp, loĝigu la studentojn en la Centro kaj ankaŭ vizitantojn kaj partoprenantojn en specialaj aranĝoj.

8) Teatra salono kaj kinejo. Tiuj ejoj, utiligataj por festivaloj, kulturaj aranĝoj ktp de la centro, estos ankaŭ je la dispoŝo de la loka publiko kiam la Centro ne uzos ilin.

9) Klasĉambroj kaj oficejoj.

10) Fako pri regiona Esperanto-agado. Ĉar la Centro funkcios kiel ligilo inter la esperantistoj el la tuta regiono, ĝi eventuale enhavu fakon pri regiona Esperanto-agado, kiu ligu interalie polajn kaj sovetiajn esperantistojn.

PLENUMO

1) Oni petu *kunlaboron de Unesko*, precipe pro la rolo de la Centro en studado de internacia lingva komunikado, interalie la lingva politiko. 2) Oni celu atingi *formalan rezolucion de Unesko*, kiu donu rekonon al la Centro kaj ĝia celo. 3) Oni utiligu la *volontulan helpon de eksterlandanoj-esperantistoj* en la konstruo de la Centro (laborbrigadoj en kombino kun perfektigaj kursoj, ekzemple). 4) Okazu sistema klopodo ene de la Esperantomovado informadi pri Bjalistoko, tiel ke *la Esperantomovado kvazaŭ "adoptu" Bjalistokon* kaj ĝiaj historio, geografio kaj vivo fariĝu plene konataj al la esperantistoj; *la urbo mem esperantigu sin laŭeble*, per ŝildoj ankaŭ en Esperanto kaj per eldonaĵoj en Esperanto pri la urbo. Tiel oni kreos iom post iom merkaton por la konstruota centro. 5) Oni *kolektu monon* por la Centro ene de la Esperantomovado kaj eventuale inter aliaj celgrupoj. Laŭeble, tiu monkolekto estu ligita al specifaj celoj, ekzemple stipendioj por eksterlandaj studentoj. 6) Oni okazigu *kunvenon pri la Centro* dum la Universala Kongreso en Roterdamo. 7) Oni starigu *konsilan komitaton* en la Esperantomovado, aldone al la organiza komitato. Tiu konsila komitato konsistu el konataj kaj respektataj esperantistoj. 8) Laŭeble oni starigu *kunlaboron* kun la Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE).

Kien ŬEA en sia naŭa jardeko?

"Okdekjariĝo ne estas vere jubileo," oni diris al mi antaŭ nelonge, "nur la fino de plia jardeko." Nu, kvankam decas esti modestaj (kaj vi ne legos ĉi tie prognozojn pri la Dua Jarcento ktp!), tamen indas pensi almenaŭ pri tiu nova jardeko, kiu samtempe komenciĝas. Tial la diskuteca aspekto de la sekvaj paĝoj, kiujn ni malfermis al la pensoj de la legantoj.



teca aspekto de la sekvaj paĝoj, kiujn ni malfermis al la pensoj de la legantoj.

Mi estu sincera: mi rimarkis kelkajn problemojn en ĉi tiu tre disa konversacio, kie la interparolantoj sidas en diversaj kontinentoj.


Parte temas pri manko de informoj: Oni vere ne scias,

kion oni jam pensis, proponis, provis aliloke au alitempe. Parte ankau pri tio, ke oni (t.e. ni ĉiuj) malfacile distingas inter la ebla kaj malebla. Kaj plia problemo, sufiĉe fundamenta, estas la fakto ke ŬEA povas signifi ĉion ajn al ĉiu ajn.

Strange sed vere: Ankoraŭ ekzistas nenia interkonsento en la Movado pri tio, kio precize estas ŬEA. Por multaj plej gravas tiu "Ŭ": ŬEA devus gvidi (au almenaŭ kunordigi) ĉiujn partojn de la Movado, reprezenti ĝin ĉe ĉiuj internaciaj organizaĵoj ktp. Por aliaj, certe por multaj el la komitatoj kaj aliaj aktivuloj, ŬEA pli similas internacian klubon — preskau la malon de universaleco. Aliaj esperantistoj aktive kritikas ŬEA-n au malestime ignoras ĝin. Kaj eble estas multaj, kiuj ne scias kion atendi de ŬEA, kiuj iam membriĝas por jaro au du, ricevas la Jarlibron kaj — eble — la revuon, sentas malkontenton sen scii la kialon kaj foriras, pasive au elreviĝe.

Pro ĉio ĉi, la simpozio pri ŬEA "Al nova strategio por nova jardeko", kiun oni planas por la 23a de julio en Roterdamo,

estas potenciale grava kontribuo al daŭranta debato. Pensu pri ĝi, dum vi vagas tra la sekvaj paĝoj. Kiujn demandojn vi mem starigus tie? Kiujn ideojn vi proponus? Se vi volus sed mem ne povos ĉeesti — kaj tio aparte validas por vi ekste-reuropanoj, kies reagoj tiel ofte mankas al ni — surpaperigu iujn pensojn kaj sendu ilin al la redaktoro. Ne timu, ke ili ne estos sufiĉe interesaj au realismaj! Pasis okdek jaroj de post la fondo de ŬEA, sed ankoraŭ neniu el ni kapablas difini precize ĝiajn realan au latentan povojn.



Mark Fettes

Ĉu redukti la veston aŭ pligrandigi la ŝtofon?

Kelkfoje dum la pasinta jaro ni aludis al analizo, kiun faris Gian Carlo Fighiera fine de 1986 pri la agado de UEA kaj precipe de la Centra Oficejo. Temas pri raporto tro longa por redoni ĉi tie, sed ĝia emfazo speguliĝas en la jena kontribuo al ĉi tiu diskuto:

Pro tio, ke niaj fortoj ne permesas al ni agi same intense sur ĉiuj kampoj, ŝajnas konsilinde, ke ni elektu kelkajn sektorojn kie nia interveno plej urĝas: Al ili ni dediĉu prioritatem nian atenton. En lastatempaj paroladoj kaj artikoloj de UEA-prezidanto Tonkin troviĝas taŭgaj proponoj. Tute konkrete, temas pri informado kaj instruado. Sekvante, sed ne blinde imitante la kutimon de aliaj internaciaj organizaĵoj, UEA ellaboru apartajn projektojn gvidatajn de komisiitoj, prefere komitatanoj, sur tiuj kampoj:

“Limigi la taskojn de la Oficejo”

eldonado de informiloj tradukeblaj nacilingven, restartigo de Internacia Gazetara Servo, stimulado kaj aŭspiciado de pedagogiaj kursoj, produktado de modernaj lerniloj k.s.

Ni konsciu dekomence, ke ĝis nun la Centra Oficejo (CO) respondecis pri tro multe da taskoj. Tio klarigas la ciklajn kolapsojn, malfruojn kaj neplenumon de gravaj laboroj. Konsiderante, ke niaj financaj rimedoj ne permesas al ni dungi pli da oficistoj, ni devas celi limigi iliajn taskojn per decentrigo for de la CO, kaj samtempe plibonigi la traktadon de la restantaj oficistoj.

Tiuj konceptoj estas hodiaŭ sufiĉe universalaj en la mastrumado de entreprenoj. Tamen mi ne pretendas posedi la sol-veron. Se aliaj konas pli oportunajn vojojn, ili klarigu al ni siajn pensojn.

Gian Carlo Fighiera

La eksiĝo de Fighiera kiel estrarano sekvis la konstaton, ke la Estraro malvolonte aplikus tiujn ĉi principojn tiel draste, kiel li proponis: ekzemple per redukto de la Libro-servo, eloficejigo de la kongresa administrado ktp. (Ĝenerale oni preferus elserĉi novajn rimedojn por subteni la nunajn agadon kaj strukturon.) Pluraj el liaj rekomendoj por administrada pliraciigo estas tamen jam aplikataj.

La raporton Fighiera antaŭis propono de Victor Sadler (direktoro de la CO de 1968 ĝis 1980) kaj sekvis propono de Kees Ruig (iama TEJO-aktivulo, administristo) pri koncepta restrukturigo de la CO kaj la agado de UEA. Jen ĉerpaĵo el tiu dua:

Trafohumante la Jarlibron, oni dronas en la amaso de oficejoj (4), instancoj (2), institucioj (12), fondaĵoj (12), fakaj asocioj (55) kaj agadoj (17). Kun multaj UEA iel havas rilaton, eĉ se nur kiel kontperanto. Kaj la kresko daŭras: ekzemplo estas la bjalistoka iniciato. Ŝajnas al mi, ke tiu sovaĝa kresko vualas la vojon tra Esperantujo, diserigas la bonefikojn kaj donas tro multe da aldona laboro

precipe al la CO. Bonvolu ne pensi, ke mi pridubas la utilon de tiuj “unuoj”; kontraŭe, ili grave kontribuas al la apliko kaj disvastigo de la Internacia Lingvo. Sed simple-

“Sovaĝa kresko diserigas la Movadon”

co kaj laŭceleco estas la bazo de bona organizo kaj ŝparigas financajn rimedojn.

Unue, diversaj el tiuj pli ol cent unuoj havas samajn aŭ kongruajn laborkampojn. Mi proponas organizan integriĝon, laŭ kiu UEA transprenus fincan respondecon pri la plej gravaj unuoj kaj la CO fariĝus serva kaj kunordiga centro por la esperantistaro. Ĉiu unuo pagu por la servoj, kiujn ĝi ricevas de la CO, same kiel UEA pagu por la dezirataj servoj al la UEA-membraro. Trookupeco de la CO-anoj ne eblus, ĉar tiel la mono por necesaj pliaj oficistoj estus je dispono. Se iu unuo ne povus pagi la petitajn servojn, ĝi serĉu alian solvon ekster la CO, kaj se ankaŭ tio ne eblus, tio signifus ke ĝiaj membroj-apogantoj ne pagas sufiĉe por funkciigi ĝin kaj tiu unuo cedu.

Alternativo al la enarana CO estus malgranda senvestigita CO, nur por la esencaj servoj al la UEA-membroj. Unu sekvo ja estus, ke sovaĝa kreskado neniel estus haltigebla, kaj oni tiel lasus la merkaton (same kiel nun) al libervola bonvolo kaj amatorismo.

Kees Ruig (Nederlando)

1) Ĉu oni ne provu taksi la procentaĵon de la laboroj nun plenumataj en la CO, kiuj principe povus plenumiĝi ekster la Asocia sidejo se ekzistus taŭgaj homoj kaj materiaj kondiĉoj? Kaj kiom da orient-eŭropanoj atendeble fariĝus individuaj membroj, se ili povus kotizi per sia landa valuto al filia oficejo, ekzemple en Budapeŝto, kiu transprenus tiujn taskojn?

2) Kiel fakte aspektas la nuna labordisdivido en la CO? Sub la realaj kondiĉoj ne eblas senplue proponi ion ajn

“Necesas pli da informoj kaj pli vigla diskuto”

novan, kion faru “UEA” (t.e. ofte la Oficejo), sen sugesti reduktojn aliloke — sed oni bezonus kelkajn sciojn por sence fari tion.

3) Ĉu eblus ia “Jarlibro plus Adresaro”, t.e. Jarlibro ampleksigita je nomoj, adresoj kaj interesindikoj de membroj, kiuj ne pretas plenumi delegitajn servojn sed pretas pagi, eventuale laŭ aparta membrokategorio, la kostojn de tia aperigo? Tiel oni havigus pli utilan kontaktperilon

kaj altigus la allogon de individua membreco, almenaŭ en la kategorioj MJ kaj MJ-K.

4) La revuo *Esperanto* lastatempe iĝadis pli vigla kaj diskutiga. Se elfalas legindaj manuskriptoj pro manko de spaco, kiom kostus aldoni kvar aŭ eĉ ok paĝojn al ĉiu numero? Eble tro, sed sciindus. Kiom oni ŝparus per malpli luksa papero aŭ aliaj teknikaj ŝanĝoj? Mi volonte vidus pli da debatecaj eroj, kiel pasintan decembron (Blanke/Albault), eventuale ankaŭ kun la ebleco ke ĉiu debatanto samloke kritike pesi la argumentojn de la alia(j).

Gary Mickle (okcidenta Berlino)

Mallonge pri tiu lasta demando: La revuo estas ĉi-momente ĉe grava poŝta pezolimo. Aldono de kvar paĝoj (je kio ankaŭ mi sopiras) tial altigus la afrankon je 50%, kvankam malpli peza preso ŝajnas esplorinda.

Plilarĝigon de la financa bazo de UEA mi opinias esenca por efektiviĝi la celojn de la Asocio. Sen sufiĉaj financoj, kun nur entuziasmo de la membroj, ne eblos multon atingi.

Nun estas bona tempo por varbi pliajn dumvivajn membrojn inter la membroj-abonantoj. Certe estas centoj da

“Sen sufiĉaj financoj, ne eblos multon atingi”

homoj en la (trans)pagipovaj landoj, kiuj povus fariĝi DM, avantaĝe por si kaj por UEA.

La Societo Zamenhof havas proksimume 200 membrojn. Ĉu ne eblas duobligi tiun nombron, ekzemple per speciala, persona varbado inter la regulaj kongresanoj?

Oni bezonas atentigi pri la celoj de la diversaj fondaĵoj, kiuj allogas donacantojn diversmaniere. Kaj kvankam estas plene kompreneble, ke preskaŭ neniuj homoj emas dum sia vivo fordonaci sian kapitalon, mi opinias ke multaj inter la membroj de UEA ŝatus, ke post la morto almenaŭ parto iru al la Asocio.

Malofte ni konscias pri tio, kiom valoras la “varo” Esperanto. Ties ekspluatado okazas tre malmulte, ĉar mankas la vendo-organizaĵoj kaj la veraj vendistoj. Mi memoras nur du tiajn kazojn: la naŭlingva komerca-ekonomika vortaro, por kiu oni sukcesis trovi internacian eldonejon kapablan vendi ĝin en la koncerna medio; kaj la nunan agadon de BSO, kiu prilaboras sian tradukprojekton ne por fari plezuron al la Esperanto-movado sed por atingi komercan sukceson. Laŭ mi, pliaj eblecoj ekzistas. Necesas nur trovi ilin kaj trovi la homojn, kiuj havas la kuraĝon komerce utiligi Esperanton sur profesia bazo.

Evert J. Ŭusink (Nederlando)

UEA bezonas krom la nun jam ricevatajn diverskategoriajn membrokotizojn de geesperantistoj ankaŭ kotizojn de **neesperantistoj**: eventuale kiel “subtenantaj UEA-membroj”. (Eble estas pli facile varbi tri Esperanto-amikojn ol eduki unu esperantiston.)

Por tio necesas la sekvaj organizaĵaj paŝoj: aranĝi la varbadon en la diversaj landoj fare de konsciencaj, kapablaj

“vicĉefdelegitoj” de homoj, kiuj ne volas tuj lerni Esperanton sed ja estas por la esperantismo kaj ĝia humaneca internaciismo kaj tial pretas finance kaj morale subteni niajn celojn; peti de tiu membrokategorio malaltan jarkotizon (eble duonon de la MA-kotizo); redakti, tradukigi pere de la vicĉefdelegitoj, presi kaj dissendi simplan, aktualan informilon unu- aŭ du-foje jare al tiu kategorio de membroj. Krome UEA povus destini por ili unuecan insignon (mi proponus blankan stelon verde kadritan).

Tiu kroma membrokategorio donus financan kaj moralan apogon ne nur al UEA, sed ankaŭ al la varbantaj landaj asocioj kaj lokaj grupoj.

Gottfried Hofstätter (Aŭstrio)

Kapabluloj venas al la CO entuziasme, idealisme kaj foriras tro rapide, senesperaj pro la sento ke ili ne sukcesos plenumi la potencialon de sia posteno. Tro ofte, homoj apenaŭ lernas sian laboron kaj poste foriras. Organizaĵo ne povas esti tre efika, kun stabo de novuloj.

Por daŭre havi bonan stabon, necesas atenti kvin kampojn:

1) Taŭgaj homoj pretaj labori en la CO ne abundas. Ni kutime atendas ĝis posteno ekvakas, kaj poste serĉetas per reklamoj en la revuo *Esperanto*. Serĉado de postenuloj devas esti konstanta afero. Kunlaboro kun la landaj asocioj, ni konstante informu pri la funkciado de la CO kaj tenu liston de homoj, kiuj esprimis interesigon labori tie. Ni korespondu kun ili pri eblecoj prepari sin: La idealismo estas tia en nia movado, ke kelkaj aranĝos specifan trejnadon por pli bone servi al la movado (mi faris tion).

2) Ni ne povas atendi ĉiam tute profesiajn maturajn kunlaborantojn. Plej ofte, novulo bezonas trejnadon, kaj homoj, kiuj fariĝas administrantoj nur pro sia longedaŭra laboro, bezonas edukon kiel administristoj. Tia trejnado ne

“Serĉado de oficistoj devas okazi konstante”

troviĝas ene de la movado, sed ĝi estas tute normala en komerca oficejo. Ni trovu kaj uzu tiujn profesiajn seminariojn, kio profitigus la tutan Movadon.

3) Preskaŭ ĉiu postenulo laboras plejparte memstare kaj scias pli komplete ol iu ajn alia la situacion en sia kampo de respondeco. Indas ke la Movado fidu kaj profitu je tiu sperteco. Speciale, la gvidantaro kiu ne havas oftan kontakton kun la CO — la Estraro kaj Komitato — devas peti la konsilon de tiuj laborantoj, kaj doni al ili la respondecon fari necesajn detalajn decidojn.

4) Daŭra problemoj de la Oficejo estas troa ŝarĝo. La oficistoj povas fari miraklojn, sed ne en enormaj kvantoj. Ni do difinu raciajn prioritatojn kaj rimedojn, kaj ŝirmu la laborantojn de kapricaj aldonoj de laboro kaj respondeco.

Fine, mi sugestas ke unu postenulo estu kunordiganto de volontuloj. Tiu estas tasko, kiu postulas multe da tempo kaj organizado. Sed kun efika funkciado, ĝi povus krei dekoble pli da valora volontula laboro.

Derek Roff (Usono)

Kiaj ŝancoj ekzistas por stimuli nian librokulturon?

La artikolo de Géza Felšo (*Esperanto* 1988/p.44) ŝajnas al mi trafa, sed preterlasas kelkajn gravajn aferojn. Certe la esperantistoj en la Tria Mondo ege bezonas sciencteknikan literaturon, sed oni rajtas demandi:

- De kie venos la “enormaj sumoj” kiujn “ni investu... por eldono de sciencaj lernolibroj”? Malgraŭ la supozoj de multaj, ne ĉiuj okcidentanoj ĉiutage banas sin en lago da dolaroj.

- “Sciencteknika literaturo” estas esprimo, kiu ampleksas multe da tereno. Ĉu temas pri komputikaj libroj, lernolibroj de fiziko, referaĵoj pri superkonduktiko?

- Kiu decidos, kiuj verkoj plej taŭgas por la Tria Mondo? Ĉu ni okcidentanoj (kaj ankaŭ la orienteŭropanoj) ŝutu sur niajn triamondajn samideanojn amason da bone intencitaj, tamen tute ne bezonataj verkoj?

Ne valoras simple proponi malfacilajn demandojn; oni devas ankaŭ proponi respondojn. Ŝajnas al mi, ke la bezonantoj de la sciencteknikaj verkoj — tiuj el ni, kiuj mem loĝas en la Tria Mondo — devos iel decidi pri siaj propraj bezonoj. Eble UEA povus starigi ian komitaton aŭ fonduson, kun partoprenantoj el ĉiuj diversaj Mondo (Unua, Dua, Tria, Kvina, Oka...), por decidi pri (a) la prioritataj

“Ne sufiĉas simple postuli, ke sciencteknikaj verkoj falu el la ĉielo”

specoj de literaturo kaj eventuale (b) difinitaj verkoj (por fiziko mi rekomendus kiel bazan kurson la Prelegojn de Richard Feynman, el la angla, kaj kiel superan kurson la verkojn de Lev Landau k.a., el la rusa; aŭ eble estus pli facile verki originalajn lernolibrojn, por eviti kopirajtajn problemojn). Poste oni devus trovi kaj komisi konvenajn tradukontojn aŭ verkontojn — la plej malfacila parto de la afero, mi supozas — kaj certigi, ke oni sufiĉe rapide finos la taskon. Fine, ŝajnas al mi, ke la presadon oni povus prizorgi en la Tria Mondo mem, eble kun helpo de investoj el okcidento; tio tute ne estus tiel multekosta.

Mi opinias, ke tiu aŭ simila plano povus havi ian gradon de sukceso — eble ne tiom, kiom postulus mia samlandano Ralph Dumain (majo 1987), sed sufiĉe, por helpi kaj Esperanton kaj la Trian Mondon. Sed ĉiukaze iu ajn plano estas pli bona ol neniu ajn plano; ne sufiĉas simple postuli, ke sciencteknikaj verkoj magie falu el la ĉielo.

Donald J. Harlow (Usono)

Ankaŭ mi dubas pri la ekzisto de enormaj sumoj en la Esperanto-movado. Logike la ekonomia apogo devus veni de tiuj oficialaj internaciaj organizaĵoj kaj naciaj registaroj, kiuj sin deklaris favoraj al Esperanto; tamen ni evitu esti pedantaj, ĉar ni konscias ke tiuj bonvenaj deklaroj havas mallarĝajn limojn.

Enrique Kohei (Argentino)

Planita sciencteknika eldonado en Esperanto ja funkcias kiel taŭga varbilo por la junularo, kies sciencteknika eduknivelo tutmonde altiĝas ĉiam pli kaj pli. Se ni transirus al la kampo de la sociaj sciencoj, eble la situacio estas ankoraŭ pli favora, ĉar tie la angla lingvo ne sukcesis establi sian internacian monopolon, interalie pro ia “maluniversaleco” (kultura, nacia, lingva...) de la studobjektoj, kiuj altiras precipe nacilingvan publikon. Tial, sennom-

“En la sociaj sciencoj la angla lingvo ne establis sian hegemonion”

braj fakaj sciencaj artikoloj kaj monografioj publikigitaj en tiaj landoj, kiaj Danlando, Estonio, Bulgario, Portugalio, Nederlando... pri, ekzemple, la tieaj arkitekturaj stiloj en la 13a jarcento, restas en grandega parto nekonataj internacie, eĉ de fakuloj mem, kiuj ĝenerale ne kapablas sciopovi samtempe tiom da malsamaj lingvoj. La rolo de Esperanto kiel pontlingvo estus relative faciligita en tiu sfero de la homa scio, pro la fakto ke tradukoj anglen kaj francen ne abundas.

Evidente, tia vastskala tradukentreveno postulus de la esperantistaro akurategan planadon kaj kunlaboron.

Hernâni A. Resende (Portugalio)

El letero de la estro de la irana eldonejo Atai al la ĝenerala direktoro de UEA:

Ĝis nun ni investis pli ol 4,5 milionojn da tumanoj, t.e. ĉirkaŭ 1,5 milionojn da guldenoj laŭ la oficiala kurzo, en la ofsetan eldonon de Esperantaj libroj. Komenci tion ne estis facile, ĉar kelkaj libroj ekvendiĝis en nur 50 ekzempleroj kaj ofseti malpli ol du-tri mil ne estus ekonomie. Ni tion solvis per antaŭvendoj kaj aliaj helpoj, kiujn provizis M.H. Saheb-Zamani. Nun tion, kion ni komence faris nevolonte, lerninte mem Esperanton ni faras ege volonte!

La vidpunkto de s-ro Saheb-Zamani dekomence estis tio, ke dum la Tria Mondo restos ne-memsufiĉa en eldonado Esperanto neniam povos sukcesi tie, pro devizaj pro-

“Dum la Tria Mondo restos ne-memsufiĉa en eldonado, Esperanto neniam povos sukcesi tie”

blemoj ktp. Ni bedaŭrinde devis elekti inter du alternativoj: aŭ progresigi Esperanton, aŭ zorgi pri la kopirajtoj de eŭropaj eldonistoj. Vi certe ankaŭ scias, ke Irano neniam subskribis la Bernan Konvencion pri Kopirajto. Provizore la eldonado de Esperanto-libroj povas

alporti nenian profiton al eldonisto en la Tria Mondo, sed sen tiuj presaĵoj, ekzemple la ofsetoj de la Nobla Korano kaj PIV, Esperanto certe restus en ege komenca grado kaj ne estus serioze rigardata. Nenio povas sufoki kaj elradikiĝi la antaŭjuĝojn pri Esperanto tiel efike, kiel abundaj librotitoloj kaj valoraj vortaroj.

Behruz Atai (Irano)

La leteroj de J.S. Skorupski (Berlino) kaj Eŭgeno S. Perevertajlo (Sovetunio) pri la librofoiroj (*Esperanto* 1988/p.15) instigis min rakonti pri la spertoj de Bulgara Esperantista Asocio sur tiu kampo kun la espero, ke ili povos esti instruaj por la aliaj landaj asocioj.

En 1984, laŭ mia iniciato, BEA proponis al la organiza komitato de la 16a Internacia Libro-ekspozicia Foiro en

“La librofoiroj vere meritas pli da atento”

Sofio (kiu okazas ĉiun duan jaron) inviti kelkajn Esperanto-eldonejojn partopreni per apartaj aŭ komuna stando. Ĝi eĉ petis la organizon komitaton malaltigi la kotizon por la Esperanto-eldonejoj, antaŭvide de tio, ke ili ne estus ekonomie fortaj. Kiam neniu el la invititaj eldonejoj respondis, BEA decidis mem aranĝi standon. En ĝi estis ekspoziciataj ĝiaj eldonaĵoj, libroj de diversaj Esperanto-eldonejoj, bulgaraj kaj alilandaj periodaĵoj, gramofonaj diskoj kun Esperantaj kantoj k.a. Diagramo montris la staton de la tutmonda eldonado de Esperantaj libroj en la lastaj jaroj. Volontuloj-ĉiĉeronoj deĵoris en la stando dum la tuta foiro kaj liveradis informojn pri Esperanto kaj ĝia literaturo. El propaganda vidpunkto la sukceso estis granda kaj kuraĝiga, ĉar la stando vekis intereson ĉe multaj vizitantoj.

En 1986, ĉe la 17a Foiro, BEA partoprenis la duan fojon, sub la slogano “La Esperanta libro servas al la paco”. Tiun foiron partoprenis 127 librofirmaoj, reprezentantaj 900 eldonejojn el 47 landoj de Eŭropo, Afriko, Ameriko kaj Azio. Preskaŭ sep mil personoj vizitis la standon de BEA, inter kiuj estis reprezentantoj de eksterlandaj librofirmaoj kaj ankaŭ Georgi Jordanov, vicprezidanto de la Ministra Konsilio kaj prezidanto de la Komitato por Kulturo, kiun akompanis membroj de diplomaciaj misioj en Bulgario kaj oficialaj gastoj. Li esprimis sian admiron pri la profesia aranĝo de la stando.

La partopreno de BEA en la sofia Foiro fariĝis jam tradicio, kaj nun BEA preparas sin por la partopreno en la 18a Internacia Libro-ekspozicia Foiro. En aliaj internaciaj foiroj, Esperantaj libroj el Bulgario estas prezentataj en la komuna bulgara stando. En la foiro en Moskvo, 1987, BEA-n reprezentis Georgi Miĥalkov, ĉefredaktoro de la Eldonejo de BEA. Laŭ la informoj, kiujn ni havas, ankaŭ en la standoj de GDR, Hungario kaj Vjetnamio estis ekspoziciataj Esperantaj libroj. Por la plej bona efiko estas necese, ke la libroj aperu en aparta sekcio kun ŝildo “Esperantaj eldonaĵoj”. Tion faris Ĉina Popola Respubliko en sia stando en Sofio, 1986, kie deĵoris kiel ĉiĉerono la agema esperantistino Shi Gui-bao. La spertoj montris, ke la sukceso de standoj en la librofoiroj ege dependas de la ĉiĉeronoj — de iliaj agemo, lerteco kaj informiteco.

Dimităr Hăgiev (Bulgario)

Se oni vere volas ke Esperanto estu efektive tutmonda lingvo por ĉiuj, nepre necesas ke Esperantaj libroj kaj kasedoj estu vendataj ĉe komercaj vendejoj kaj ne per la vojo de la asocioj. Ĉar la publiko ne povas facile aĉeti niajn librojn kiel tiujn de la aliaj lingvoj, Esperanto daŭre aspektas kiel neserioza, duone religia kaj lingva sekto.

Mi petas la movadajn estraranojn serioze pripensi tion senprokraste.

Marie-Louise Bodard (Francio)

OK JAROJ DA ORIGINALA BELETRO

De post januaro 1981 mi trarigardis la revuan rubrikon “Laste aperis...” kaj nun kalkulis la eldonojn de originala beletro. Kompreneble, kalkulante la nombron da paĝoj oni nenion scias pri la **arta** valoro, tamen la rezulto estas certgrade pensiga.

Poezio originala: entute 2612 paĝoj, ne enkalkulante la reeldonon ŝanĝitan de *Esperanta antologio*. El tiuj, bulgaraj aŭtoroj verkis 527p., ĉeĥaj 471p., britaj 399p. La ceteraj venis el Brazilo (187p.), Italio (175p.), Sudafriko, Danlando, Pollando, Nederlando, Jugoslavio, Israelo kaj Japanio.

Prozo originala: entute 8795 paĝoj. Tiuj jene dividiĝas: romanoj 4792p., rakontoj-noveloj 2383p., eseoj 1283p., skeĉoj kaj dramoj 337p. El la entute 27 romanoj hungaroj verkis ne malpli ol 9 (1405p.), ĉeĥoj 5 (788p.), ankaŭ el Svislando venis 5 (643p.), el Francio 4 (832p.). La ceteraj romanoj venis el Belgio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Britio, Ĉinio kaj Bulgario. Pri rakontoj kaj noveloj lastatempe plej fekundis Japanio (572p.), poste Jugoslavio, Pollando kaj Nov-

zelando. Eseojn liveris precipe Britio (365p.), Francio (350p.) kaj Israelo (212p.).

Oni devas atentigi, ke ekzemple preskaŭ ĉiujn romanojn el Hungario verkis unu persono (Nemere), kaj simile pri tiuj el Francio (Lorjak) kaj Svislando (Valano). Pri eseoj gravas ĉefe Waringhien kaj Auld. Ĉu estas entute senechive provi ion konkludi el tiuj malmultaj ciferoj? Se kompari kun nacilingva verkado, la originala Esperanto-verkado **kvante** ankoraŭ ne multon signifas; sed komparante ĝin **kvante** kun antaŭaj jardekoj, facile konstatablas relative forta kresko. En *Vereco distro stilo* William Auld listigis entute kvindek da originalaj romanoj inter 1908 kaj 1980; se post tiam aldoniĝis jam 27, la plirapidiĝo ja tuj klaras! Pli malpli same statas, miasupoze, pri noveloj/rakontoj kaj eseoj; se la originala poezio iom malpli furoras ol en la gloraj jaroj de Stafeto, la rikolto tiutere tamen ne estas timige eta. Nur la teatra arto vere postlumas. Dramece.

Isai Sumber (Nederlando)

Kiel plene profiti de nia vojaĝa potencialo?

Ĉie en la mondo la ŝtatoj konsideras la turismon unu el la plej gravaj industrioj. Same en nia movado, la agado estas plej efika kie la turismo estas unu el la prioritatoj kaj integra parto de la movada strukturo.

La plej bonan bildon mi povas doni pri la lastatempa evoluo en Pollando. La oficejo de Esperantotur troviĝas ne en Varsovio sed en Bydgoszcz, kie ĝi memstare povas financi sin kaj samtempe grandparte subvencii la landan movadon sub kontrolo de la financministerio. En la oficejo laboras trideko da oficistoj, plejparte (sed ne senescepte) esperantistoj. Sed la plej bonan bildon donas la agado de la lokaj kluboj: el la preskaŭ dek mil membroj de PEA, tri mil troviĝas en la vojevodio (distrikto) Bydgoszcz, kie funkcias trideko da kluboj inkluzive de dek kvin en la urbo mem. Similan situacion oni trovas en Bulgario, kie

“Vitamino por kriza movado”

nur en Sofio oni lastatempe malfermis la 26an lokan klubon, kaj en Hungario, kies ĉefurbo Budapeŝto ampleksas dudekon da aktivaj kluboj. Ekster Eŭropo, en Kolombio kaj Kubo la movado iras la saman vojon laŭ iniciato de Monda Turismo.

Tre strange estas, ke tiu agadmaniero renkontas la plej grandan malestimon, eĉ kontraŭagadon en okcidenta Eŭropo. Tie la maljuniĝintaj aktivuloj obstine daŭrigas per tradiciaj forpasintaj agadmetodoj, ne plu ŝatataj de la junularo kaj kiuj demonstris sian malefikecon. Por ili Esperanto estas ideologio, kiun ili devas savi de la produktmerkato.

En Pollando, Esperantotur organizas kursojn por siaj klientoj, seminariojn pri pedagogio kaj vojaĝgvidado kaj venigas gastprelegantojn el eksterlando. Dum la jaro 1987, diverslandaj televidaj skipoj produktis dekon da videobendoj kaj filmoj pri la Esperanto-movado kaj la vojaĝoj de Esperantotur: plia novaĵo por nia movado. En la nuna jaro, Monda Turismo ampleksigas sian internacian agadon kadre de la turismaj klopodoj de UEA kaj en kunlaboro kun la Internacia Akademio pri Turismo en Monako. Dum konstante ekspansias la kunordigado de la turismaj klopodoj en Eŭropo kaj la Amerikoj, niaj klopodoj sin turnas al Afriko, kien iros esplori delegita teamo nia, kaj al Azio, kien ni jam planas aviadilajn vojaĝojn.

Konkrete ni sugestas, ke UEA kaj la Landaj Asocioj starigu oficejojn pri turismo, sendependajn de iliaj jam sufiĉe ŝarĝitaj centraj oficejoj, kiuj financu sin mem kaj krome subvenciu la movadan agadon. La Centra Oficejo Turisma de UEA ĉefe zorgu pri la Universalaj Kongresoj, kunordigado de la turismaj klopodoj kaj la starigo de Turisma Esperanto-Fonduso, kiun oni povus uzi por aĉeti aŭtobusojn por Esperantaj Buslinioj laŭ la ekzemplo de Esperantotur.

L. De Bruyne (Monda Turismo, Belgio)

Cent jarojn ni konstruas nian domon, la Esperanto-movadon. D-ro Zamenhof donis al ĝi perfektan fundamenton, ni havas jam solidan tegmenton en Unesko, bone laboras niaj sciencistoj ĉe la plej altaj etaĝoj. Mankas al ni tamen la malpli altaj etaĝoj, por teknikistoj, por laboristoj kaj precipe la teretaĝo por la malplej pretendemaj homoj, kiuj estas la plej multaj.

Esperanto en turismon! tio estas tre bona devizo kaj oni jam multe penis kaj faris tiudirekte. Bona estas la agado de Esperantotur, tamen la instigo al lernado ne estas en ĝi sufiĉe forta. Ĝuste tio ĉi estas la bezonata “teretaĝo”. Oni

“Turismo estas nia teretaĝo”

cetere ne vidu sub “turismo” nur la veturantajn scivolemulojn, sed ankaŭ vendistojn, kelnerojn kaj simile. Por konsciigi ilin mi proponas, ke oni presu “vizitfoliojn”, simile grandajn, kiel estas vizitkarto, kun teksto en la lingvoj de la vizitataj landoj kaj enhavo proksimume jena: “Ni pli bone komprenus unu la alian, se vi sciis la internacian lingvon Esperanto. Informojn petu de . . . (adreso de la landa asocio).” Veturonte eksterlanden oni aĉetus (eble ĉe sia landa asocio) bloketon de tiaj folioj, por povi ilin taŭge disdonadi. Eble utilis aranĝi specialajn skribajn kursojn en turisma Esperanto, ekzemple pri manĝaĵoj.

Marie Bartovská (Ĉeĥoslovakio)

La praktiko, ke la Universala Kongreso okazu unufoje jare en nur unu lando, ne ŝajnas al mi sufiĉa por la tutgloba prosperigo de la Movado. Kiam tiuj kongresoj sukcesos viziti ĉiun landon el la pli ol 160 sur la terglobo? Post

“Kiam la UK sukcesos viziti ĉiun landon sur la terglobo?”

160 jaroj, ĉu ne? Kaj cetere, la grandaj multnombre vizitataj UK-oj estas ege ĥaosaj kaj por la Movado ne sufiĉe bonefikaj.

Mi proponas la organizon de (pli malgrandaj) UK-oj sur la diversaj kontinentoj, ne samtempe sed dise tra la jaro, kiuj koincidu loke kaj tempe kun la loka landa kongreso kaj estu organizataj kunlabore inter UEA kaj tiu landa asocio. Tiuj kongresoj kolektu esperantistojn ne nur el sia kontinento sed ankaŭ el la najbaraj kontinentoj. Tiel okazos multe pli da reciprokaj personaj kontaktoj inter la esperantistoj, kaj la prosperiga efiko de la UK pli rapide disvastiĝos tra la terglobo.

Ganĉo Damjonov (Bulgario)

La UK devas esti la baza forumo, en kiu oni priparolu la formojn kaj rimedojn por la disvastigo kaj lernado de Esperanto. Due, la kongreso devas funde trakti apartajn problemojn de la ekstera mondo, el la specifa vidpunkto de la Esperanto-movado sed surbaze de la agado de UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj. Trie, la kongreso devas esti paca manifestiĝo, kaj oni povus emfazi ankoraŭ pli klare la kontribuon de la movado al kompreniĝo inter la popoloj. Kvare, la UK devas transformiĝi en kulturen manifestaĵon, kiu montru al la publiko, ke Esperanto

“La UK estas antaŭ ĉio la kongreso de UEA kaj devas solvi difinitajn problemojn”

estas plenvalora lingvo kiel ĉiuj aliaj. Kvine, la kongreso devas konservi sian universalecon kaj resti renkontejo por la internaciaj E-organizaĵoj kaj la ordinara esperantistoj, samkiel okazo por konatiĝo kun la gastiganta lando kaj stimulilo por la loka movado.

Tamen oni ne devas forgesi, ke la UK estas antaŭ ĉio la kongreso de UEA, kiu devas solvi per ĝi difinitajn problemojn. Ĝi devas doni agaddirektojn por la landaj asocioj, akcenti la aktuale plej urgajn taskojn; en la programo oni devas pli emfazi la spertinterŝanĝon, aparte gravan por movado de neprofesiuloj, tiel estigante iaspecan seminarion por kvalifiko de aktivuloj. Lastloke sed ne lastrange troviĝas la financa funkcio de la kongresoj, kiuj donas monhelpon al UEA.

Pensi, ke subite povus okazi radikala ŝanĝo en la maniero de okazigo de la UK-oj, estus nereale. Necesas tamen ekpensi pri iuj ŝanĝoj en la strukturo, celoj kaj taskoj de la UK-oj, ĉar ili restas unu el la plej gravaj faktoroj en la evoluigo de la monda Esperanto-movado.

Dimităr Papazov (Bulgario)

En la loko, kie okazas la kongreso, la tuta urbo devas scii pri ĝi, aŭdi kaj vidi. En Aŭgsburgo oni iomete aranĝis en la strato muzikon kaj kantadon, sed tio ne sufiĉas. Oni devas unu tagon el la sep dediĉi nur al la neesperantistoj. Matene oni devas aranĝi paradon tra la urbo; posttagmeze la kongresejo devas esti malfermita al ĉiuj, por liberaj kaj senperaj kontaktoj inter la kongresanoj kaj la popolo. Se iu infano rakontos en sia lernejo, ke hieraŭ per la helpo de loka esperantisto li parolis kun japano, ĉino, arabo aŭ afrikano, ĉiuj liaj samklasanoj envios lin kaj tio instigos ilin interesiĝi pri Esperanto. Tiel disdoni malgrandajn monerojn aŭ poŝtmarkojn al infanoj utilas pli ol informiloj kaj prospektoj.

J. Giladi (Israelo)

Atentindaj estas la rimarkoj de Ivo Durwael en *Esperanto* 1987/p.183. Kial ne organizi staĝojn, tuj antaŭ aŭ tuj post la oficiala semajno, kiuj **utilus** en la profesia, sana, spirita vivo de la partoprenantoj de la UK? Jen kelkaj ideoj:

- Kiel efike paroligi la homojn pri iu temo?
- Kiel klare esprimi sian opinion en publika kunveno?

- Kiel fari raporton pri kunveno, prelego, legaĵo?
- Kiel efike instrui (ne nur lingvojn)?
- Kiel vendi kaj komerce aktivi?
- Kiel zorgi pri sia sano (mense, spire k.s.)?
- Kiel kuiri, ekz. vegetarane kaj alloge?

Se UEA proponus tiajn staĝojn **utilajn**, je honesta prezo, mi certas ke ili interesus multajn mense junajn esperantistojn.

A. Flandroy (Belgio)

Sub la titolo “Prelegvojaĝantoj serĉataj” aperis antaŭ kelkaj monatoj anoncoj en la Esperanto-gazetaro. Precipe tiuj en *Esperanto* kaj *Budapeŝta informilo* elvokis reagojn, entute ĉ. dudek. Decas nun raporti pri la rezultoj, kaj precizigi niajn bezonojn kaj planojn.

Ni distingas inter du specoj de “prelegvojaĝantoj”: tiuj, kiuj pro ferioj, profesio aŭ studo jam vojaĝas propramone, sed estas pretaj utiligi tiun vojaĝon ankaŭ por kontakti Esperanto-klubojn, sen kroma subvencio de UEA; kaj tiuj, kiuj vojaĝu kiel “senditoj” de UEA por unujara periodo, kaj por kiuj UEA pagus la vojaĝon kaj la restadon laŭ tre modestaj kondiĉoj.

Pri la dua kategorio ni intertempe iom rezignis, ĉar la relative grandaj sumoj bezonataj por tiaj tutjaraj vojaĝoj kaj restadoj prefere estu uzataj por aliaj celoj: ekzemple, por inviti afrikanojn al Eŭropo anstataŭ sendi blankulojn al Afriko. Tiel esprimis sian preferon pluraj konsultitaj amikoj, afrikaj kaj eksterafrikaj. Sed... ankaŭ envenis

“Konvinko-povaj vojaĝantoj efike helpas la lokajn movadojn”

malaj opini-esprimoj. Estis ankaŭ tiuj, kiuj pledis por kaj... kaj... Ili evidente plej pravas, sed ilia prefero estas bedaŭrinde la plej kosta.

Do almenaŭ provizore ni elektis por invitado de afrikanoj al la kursoj kaj kongresoj en Eŭropo. Dum la somero de 1988 venos kvin aŭ iom pli da afrikanoj al Bulgario (Pisanica), Zagrebo (IJK) kaj Rotterdam (UK).

La aktualeco de la unua kategorio restas tamen ekzistanta. Feliĉe iuj jam anoncis sian pretecon kombini vojaĝon por feriado aŭ studado kun esperantista agado. Al kelkaj el ili UEA faciligas la decidon fari kromvojaĝon aŭ krom-restadon, subvencianta per iom da mono. “Iom” signifas 100 ĝis 300 guldenojn. Ni pensas ke tiom da mono valoras la ebligo de vizito al klubo aŭ asocio en Afriko, por ke vizitanto povu vigligi la kluban programon, inspiri freŝan kuraĝon al la malproksimaj amikoj, doni mallongajn lingvokursojn, prezenti la Esperanto-movadon al lokaj aŭtoritatoj, al lernejestroj kaj universitatoj kaj al ĵurnalistoj. Kompetenta kaj konvinko-pova esperantisto povas tiel efike helpi la lokan movadon, kaj ni kredas ke tio valoras, se necese, kelkcent guldenojn.

Bedaŭrinde ni ne povas financi plenajn vojaĝojn, la flugbiletojn, la hotelojn. Nia anonco ne estis tre klara pri tio, precipe ne pri la signifo de “iom da mono”. Sed bonvolu memori nin, kiam vi jam planas vojaĝon al Afriko: La unua kategorio ĉiam estas malferma por vi...

Hans Bakker (Kastelenstr. 231-II, 1082 EG Amsterdam)

Ni bezonas lernilojn por la motivita memlernanto

Iom simile kiel Esperanto mem, ĝiaj lernolibroj kutime ambicias esti universalaj: Ili celas legantaron ĉiuspecan, de bazedukitoj ĝis universitatanoj. Malprave, laŭ Jiří Karen, profesoro pri filozofio kaj konata poeto en la ĉeĥa lingvo. En jena artikolo li pledas por pli nuancita metodiko de Esperanto, kiu ekspluatus la lingvan-kulturan-fakan fonon de la lernantoj por kapti kaj teni ilian intereson.

Gajni novajn adeptojn estas postulo signifanta vivon aŭ morton de nia lingvo kaj movado. Sen Esperante parolantaj homoj ni ĉesas ekzisti, akcentas prave H. Tonkin. Mi volas diri: sen **altnivele** parolantaj, legantaj, skribantaj, komprenantaj kaj spirite **kreantaj** homoj. Parolante pri instruado, ni pensas pri kursoj (lokaj aŭ skribaj), pri instruado en lernejoj. Sed la situacio montras, ke krom instruado ni devas akcenti la signifon de la aŭtodidakta



memlernado. Memlernanto estas persono, kiu ne bezonas gvidon. Li gvidas, instigas, kontrolas sin mem. Do la metodo oportuna en tempoj kiam la homo sidas hejme ĉe televidilo.

La memlernadon de Esperanto ebligas la reguleco kaj facileco de la ortografio, prononcado kaj gramatiko kaj la internacieco de la vortaro. Kompare al E-o, lingvoj naciaj estas surbaze de tiu metodo neellerneblaj perfekte. Tamen, ĝi postulas certan instruitecon, animoriĉecon, firman volon, planitecon kaj karakteron fini, kion oni komencis. Memlernanto cetere nepre bezonas iun kleran esperantiston, kiu inspiras kaj helpas al la memlernanto korekti la erarojn.

Lernolibroj de E-o instruas ne nur la pasivan parton de la lingvo (legado kaj komprenado), sed samtempe ankaŭ la aktivan (parolado kaj skribado). Tio estas troŝarĝa kaj enuiga por aŭtodidakto, kaj aparte por la klera fakulo. Li perdas pro tio intereson, ĉar li estas persono, kiu alkutimiĝis uzadi sian intelekton, fantazion kaj sperton. Li jam **anticipe** konas kelke da fremdaj lingvoj. La nivelo de la lernmetodo devas do respondi al la eduka nivelo de la memlernanto. Ni ignoras tiun fakton. *Niaj lerniloj estas konstruitaj surbaze de la ideo, ke memlernanto konas nenion kaj ĉion li devas nun ellerni. Ega eraro.*

Mi akcentas do la ideon: klera memlernanto havas kiel unuan celon **nur** 1) kun plena kompreno *legi* enhave valorajn tekstojn, kiuj rilatas al lia fako; 2) perfekte *kompreni* la lingvon parolatan de personoj, kiuj majstre konas la lingvon. Tiaj homoj, eĉ se ili ne scias mem paroli aŭ skribi nian lingvon, ebligas al niaj eldonistoj, verkistoj, entute al artistoj havi **vastan legantaron kaj aŭskultantaron**. Kaj ĝuste tio mankas al ni: legantoj kaj aŭskultantoj altnivele majstrantaj nian lingvon. La homojn meze kaj evidente alte kulturitajn ni povas do “kapti” surbaze de la memlernado kaj surbaze de lerniloj kompilitaj sur principo de *du fazoj por lernado — pasiva kaj aktiva*.

Por ne esti abstrakta, mi priskribos, kiel mi lernis E-on aŭtodidakte. Eble tiu praktiko inspiras niajn pedagogojn verki lernolibrojn taŭgajn por la supre menciitaj celoj. Pardonu kelke da personaj informoj, kiuj ne povas manki.

Dum la jaroj 1972-1976 mi trasuferis tri infarktojn. Malsano, kiu tamen kreis eblon ekkoni E-on kaj ekinteresiĝi pri ĝi. Iu esperantisto, dum mia restado en banloko, montris al mi tradukojn de famaj verkistoj en E-o. Sed *kial* mi kiel verkisto lernu tiun lingvon por legi, kion mi povas legi en originalo, aŭ en estetike altnivelaj tradukoj en la gepatra lingvo? Tiam li montris al mi originale verkitaĵojn poemojn far Kalocsay, W. Auld, M. Boulton, B. Ragnarsson, kaj ĉefe impresis min *Esperanta antologio*. Ĉu vere la originala literatura kreado en E-o egalvaloras al literaturaĵoj de aliaj nacioj?

Ege gravis la aserto: E-on oni povas ellerni *rapide kaj facile*. *Oni povas ellerni la lingvon por povi en ĝi krei*. Jes, mia kolego pentristo aŭ komponisto prezentas sian verkon kaj sen iu traduko li parolas rekte al siaj aŭskultantoj. Mi bezonas la tradukiston kaj se li estas bonkvalita, li multekostas. Paŝon post paŝo mi transvolbis la abismon de hezitado. Mi komencis. Mia konatulo donacis al mi amason da revuoj *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto* kaj lernolibron en la ĉeĥa. Lia oferemo min profunde tuŝis. Mi provos. Mi studos, jes, sed nur se la afero min amuzos, se ne, mi preteriros la aferon. Mi ne volas lerni lingvon aktive, sufiĉas la pasiva kono por legi la tekstojn, *se ili estos utilaj kaj interesaj* por mi. Neniam mi planis korespondi aŭ paroli en tiu lingvo.

Mi elektis unu tekston de la poeto Ragnarsson pri literaturaj konkursoj. Kaj tiu kaptis mian atenton. Analizante la tekston, mi trovis en ĝi vortojn al mi tute konatajn (atomo, matematiko, poezio ktp). Mi provis apliki al la teksto la komparan metodon de la indoeŭropa lingvistiko. Vorto “ruĝa”. Rozo? Ne. Ĉu latina “ruber”, ĉu germana “rot”, ĉu angla “red”, ĉu litova “raudas”? Mi elserĉis en la vortaro — sangkolora. Ah, jes, ĉeĥe tio estas “rudý”. Multe da vortoj estas deĉifreblaj per tiu metodo. Plie, multajn vortojn al mi nekonatajn mi povis dedukti el internacie konataj kunmetaĵoj. Kial do parkeri, ke ĉeĥe “jedna” estas “unu”, se mi tamen konas un-isono, un-ilateral; kial parkeri, ke “dvě” estas “du”, se ĉiu konas vortojn: du-plicito, du-alo, du-eto? Kial lerni vorton “granda”, se ĉiu profano konas vorton Grand-hotel?

Analizante do la vortaron laŭ grado de la anticipa konateco, mi konkludis: la vortaro de tiu ĉi lingvo estas al homo lingve kaj ĝenerale instruita jam apriorie kaj ne-

“Kial oni instruas Esperanton analoge al la metodiko de la naciaj lingvoj?”

konscie konata. Oni devas nur la nekonscian kaj sub-konscie konatan transformi, surbaze de la intelektaj kaj raciaj procedoj, en konscie konatan.

Al mi nun klaris, kial min enuigis la lernolibro: la aŭtoroj *instruas E-on analoge al metodiko por instruado de la nacia lingvo*. Kial ili ne konscie eluzas la avantaĝojn de la lingvo? Ili nomas ĝin “internacia”, sed ne kapablas en lernolibroj eluzi tiun internaciecon de ĝia vortaro. La homoj poste malfacile parkerigas, kion ili povus racie dedukti el jam al ili konataj lingvoj. Kia perdo de energio!

Ne ĉiujn vortojn mi komprenis tuj, certe. Mi trovis en la tekstoj vortojn longajn, komplikajn, ekz. mal-san-ul-ej-o. Klaris nur, ke ĝi rilatas al “sano”, aliajn signifojn oni devis preskaŭ detektive deĉifri. Tio ne plaĉis al mi, kial do ne diri direkte: hospitalo, kliniko, sanatorio, lazareto? Ĉiu sciis klare pri kio la afero temas. Mi trovis tie ankaŭ vortojn preskaŭ en formoj japaneskaj aŭ ĉinaj (ĉiuj-tiuj-kiuj ktp). Troveblis tie vortoj malfacile elparoleblaj, vortoj, kiuj ofendis mian ĉeĥan lingvan senton, ekz. “ĉu mi . . .”, en la ĉeĥa “li observaĉas”. Tre oftis la vorto “kaj” kaj vortoj kun -jn ĉe fino. Se vortoj tiel aspektantaj amasiĝis en la frazoj, tio donis al la lingvo iomete strangan kaj nebelsonan karakteron.

Jes, al mi ne plaĉis diversaj vortoj, sed nun ek al studo de la gramatiko, eble en ĝi kernas la afero, kiu klarigos al mi *kial* la vortoj por mi konataj en sia internacia formo estas ĉi tie deformitaj. Atenteme mi legas regulon post regulo, kaj devas agnoski: la gramatiko estas vere majstro-verko. Per tio malaperas de la scenejo la nereguleco. Rilatoj inter vortoj estas tuj konstataj: La frazoj fariĝas *travideblaj, nekomplikaj, diafanaj*. Oni povas legi la frazon kompreneme.

Nun al mi klaras: *Por havi senescepte regulan gramatikon* — kaj tion mi laŭdas — *oni devas pagi tion per certa*

deformado de internacie konataj formoj de la vortoj. Aŭ internacieco perfekta, do “natureco”, aŭ reguleco kaj certa “deformado”. Ambaŭ havi oni ne povas.

Ĉiun vorton, kiu malkompreneblas kaj malfacilas, mi substrekas. Mi ne lernas tiujn vortojn parkere. Ĉiam mi kreas etan frazeton. Se mi ne komprenas vorton “acero”, mi diras: *acero* estas planto. *Arĉo* estas armilo. La frazoj estas kurtaj kaj nekomplikaj. Ili konsistas nur el vortoj al mi jam perfekte konataj, ke mi ne lernu erarojn. La lernadon mi transformas en intelektan ludon.

Tiamaniere mi akumulis sufiĉe grandan vortostokon por provi profiti el tio. Mi revenas al Ragnarssonaj tekstoj pri la literaturaj konkursoj en E-o. Legante mi serĉas nur la kernan sencon de la artikolo en ĝia tuto. Poste mi analizas la frazojn. *Pri la senco de la partoj mi juĝas el kompreno al la tuto, ne male, kiel faras niaj lernolibroj*. Pri la senco de al mi nekonataj vortoj mi juĝas laŭ la kunteksto. Nur kaze ke la nekonata vorto estas ŝlosila, mi serĉas en la vortaro.

S-ro Jiří Kořínek afable tradukis Esperanten 300 miajn poemojn el ĉeĥa verkaro. Li tradukis ĉiujn poemojn, kiuj plaĉis al li. Vere utilaj kaj interesaj tekstoj. *Mi nun lernos surbaze de miaj poemoj*. La traduko stile riĉas, versoj estas tradukitaj fidele, laŭenhave. Perdis ili la muzikon el la ĉeĥa, sed kion fari, fidela traduko tamen konservis la poezion. Komparante la originalon kun la traduko, mi lernas altnivele ĉar *surbaze de poeziaj tekstoj al mi intime konataj*. Tiel naskiĝis mia libro *Flugilhava ŝtono*, kiun tradukis amiko Jiří Kořínek kaj eldonis amiko G. A. Bays en Brazilo, serio Fonto. Kaj *tiu* fakto, ke iu tiel helpis al mi, tradukis mian verkon kaj eldonis ĝin, konvinkis min, ke vere sencas, ke mi lernu ne nur Esperanton, sed ankaŭ kompreni la artisme valorajn artaĵojn, kiujn oni kantas, recitas, aktoras, oratoras. Kaj ne nur tio — mi aspiris mem aktive paroli por povi diskuti, prelegi, demandi, respondi, interpretadi kaj finfine ankaŭ originale verki. Sed pri tio ĝis venonte.

Epiloge mi forte substrekas la neceson ellabori lernolibrojn por memlernantoj, kiuj konas pli da lingvoj kaj kapablas procedi laŭ la metodo, kiun mi skizis, do por la sciencistoj, teknikistoj, verkistoj, tradukistoj kaj entute por la homoj de pli alta lingva kaj ĝenerala kulturo en sfero de sciencoj kaj artoj. Prezenti *tiel* E-on al fakuloj ĉiuspecaj en metodike ellaborita lernolibro ege gravas. Sen renomaj fakuloj en sciencoj kaj artoj ni vere restos movado de amatoroj, kaj en tempo de la scienc-teknika kaj kultura revolucio tio signifas *resti sensignifaj*.

Jiří Karen (Ĉeĥoslovakio)

Postnoto: Karen nature parolas el sia propra, eŭropa, poeta sperto. Tamen ŝajnas al ni, ke liaj komentoj havas pli vastan aplikon. Oni en La revuo orienta lastatempe proponis bazi kurson sur la pli japanecajn trajtojn de Esperanto (parte por demonstri, ke ne temas pri “nur alia eŭropa lingvo”). Simile, se oni varbas inter vojaĝemuloj, komputistoj, pacmovadanoj... kial ne verki apartajn lernometodojn vojaĝ-, komput-, pactemajn (kaj vere interesajn), tiel uzante la jaman motivitecon de niaj lernantoj?

Novaj ebloj ĉe la kooperativa movado

Unu el la plej signifaj eventoj de la varsovia UK, se juĝi laŭ movadisma vidpunkto, estis la fondo de nova faka asocio por la kooperativanoj (Esperanto 1987/p.162). Ĝia hungara vicprezidanto, d-ro József Pál, jene priskribas la fonon kaj programon de la nova organizaĵo.

La kooperativoj ne nur plenumas gravajn ekonomiajn kaj sociajn taskojn en la plimulto de la landoj, ili samtempe formas — funkciante laŭ komunaj principoj — internacie kunlaborantan reton. La Internacia Kooperativa Alianco (IKA), fondita en 1895, nombras en 72 landoj 172 memstarajn organizaĵojn, kiuj reprezentas ĉ. 740 000 kooperativojn kun duonmiliardo da membroj.

La principoj de la kooperativoj — difinitaj de la unua kooperativo fondita en Rochdale (Britio) en 1844 — estas mondscale komunaj. Ili formiĝis kiel respondo al la defio de la mizera situacio de la laboristaro en tiu epoko. Kiel rimedojn la kooperativoj rekomendas la memvolan kunlaboron, la personan aktivadon, la materialan kaj moralan interesigon de la membroj en la komuna agado, la reciprokajn helpon. La funkciado estas bazita sur la principo de membrara memdirektado.

Ekzameno de tiuj principoj montras, ke ili estas parencaj al tiuj de la Esperanto-movado. Ambaŭ movadoj stre-

bas stimuli la internacian kunlaboron, ili ambaŭ havas demokratian karakteron. Esperanto povas faciligi la internaciajn kontaktojn de la kooperativoj; ĝi kontribuas al plialtigo de la kultura aktivado. Siaflanke, la kooperativoj havas efikajn rimedojn por helpi la instruon, kulturan kaj pacan celadojn de Esperanto.

La neceso de strikta kunlaboro inter la du movadoj evidentiĝis jam antaŭ 70 jaroj. Elstaraj personecoj de Esperanto, kiel Edmond Privat kaj Jan Zawada, instigis formi grupojn de kooperativaj esperantistoj kaj komencis organizi apartajn konferencojn por ili. Jan Zawada aperigis tiucele eĉ Esperantan revuon, *Ĉielarka standardo* (la ĉielarka standardo estas la simbolo de IKA). La komencita laboro, kiun ĉesigis la dua mondmilito, ekhavis denove elanon en la lasta jardeko, kiam en diversaj landoj fondiĝis kooperativaj Esperanto-organizaĵoj. Estas menciindaj el ili: TUCEG, brita organizo, kiu interligas la kooperativajn kaj sindikatajn esperantistojn, kaj ICEM, en Francio, kiu donas kadron al la aplikado de la Freinet-pedagogia metodo, uzante kaj la kooperativajn principojn kaj Esperanton. En diversaj landoj fondiĝis — precipe laŭ kontrakto inter Esperantaj kaj kooperativaj asocioj — kooperativaj Esperanto-komisionoj. Tio okazis en Bulgario, Hungario, FR Germanio, Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj



Argentino. Spertante la influon de tiu organizado, multaj kooperativaj esperantistoj aliĝis ekzemple el Japanio, Islando, Sovetio, Usono, Germana DR, Turkio ktp.

Ekde 1982 la koncernaj organizoj regule kunvokas fakajn konferencojn de la kooperativaj esperantistoj. La unua okazis en la urbo Gyula (Hungario), la postaj gastis en Budapeŝto, en Augsburg kaj en Plovdiv. Okaze de tiuj konferencoj oni decidis iniciati la fondon de internacia organizo kaj elektis preparkomisionon tiucele. La fondiĝo de tiu organizo realiĝis kadre de la jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, kie dum dutaga konferenco 130 reprezentantoj el 15 landoj fondis Internacian Kooperativan Esperanto-Organizon (IKEO).

Laŭ sia statuto, IKEO klopodas kunligi la tre proksime parencajn ideojn de kooperativismo kaj esperantismo. Ĝi celas regule diskonigi, helpe de Esperanto, la sci-ojn, spertojn kaj eblojn de la kooperativoj en la socia kaj ekonomia evoluprocezoj de la mondo. Ĝi intencas popularigi la efikajn metodojn de Esperanto-instruado en la kooperativa medio. Ĝi instigos la diversspecajn kooperativojn al kaj nacia kaj internacia kunlaboro.

Kiel rimedojn por atingi tiujn celojn, IKEO substrekas la ĉiam kreskantan agadon de la landaj kooperativaj Esperantaj organizoj kaj rekomendas la regulan organizon de internaciaj konferencoj, la evoluigon de fakaj kunvenoj

kaj la starigon de rektaj kontaktoj inter diversnaciaj kooperativoj. IKEO eldonas Esperantajn informilojn kaj gazetojn, proponis kunlaborkontrakton al UEA kaj celas kunlabori kun ties aliaj fakaj organizoj.

IKEO intencas enkonduki novan formon de la gvidado. La prezidantoj de la aliĝintaj naciaj organizoj fariĝas ankaŭ vicprezidantoj de IKEO. El ili ĉiam tiu estas prezidanto de IKEO, en kies lando ĝi konferencas. En tiaj cirkonstancoj grandiĝis la rolo de la oficiala ĵurnalo *Kooperativa stelo*, kiu praktike kunligas la membrojn de IKEO inter du konferencoj. Ĝian redaktan komitaton oni elektis okaze de la fondkonferenco; ĝi povas ŝanĝiĝi nur laŭ decido de la ĝeneralaj kunvenoj. La adreso de *Kooperativa stelo* estas: Pf. 191, H-5601 Békéscsaba, Hungario.

Koncerne la jaron 1988, IKEO planas la evoluigon de kooperativaj Esperanto-organizoj en novaj landoj. Ĝi serĉas kontaktojn kun parencaj organizoj. Okaze de la UK en Roterdamo ĝi organizos fakan kunvenon, kiu temos pri "La bazaj valoroj de kooperativismo". (La saman temon pritraktos la stokholma kongreso de IKA en la unuaj tagoj de julio.) Krom tiu kunveno estas planata konferenco por reprezentantoj de la kooperativaj organizoj kaj lernejoj de la najbaraj landoj Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando kaj GDR. Oni planas aranĝi ankaŭ aliajn regionajn konferencojn.

József Pál (Hungario)

UNIVERSITATA INSTRUADO

Budapeŝto pluiras kun du profesioj

Jam multaj scias, ke la 21-an de aŭgusto 1987 pro grava malsano mortis prof. d-ro István Szerdahelyi, universitata docento, gvidanto de la Esperanto-fako en la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd ekde ĝia fondo en 1966. Li famigis la fakon ankaŭ en internaciaj pedagogiaj kaj fakaj rondoj per la tiea scienca laboro, per universitataj lernolibroj kaj diplomigis preskaŭ 100 gestudentojn.

Post aŭgusto la sorto de la fako estis duba, sed per lastmomenta decido la instrua kaj scienca laboro pluiris eĉ kun du plentempaj postenoj, kiujn plenumas du eksstudentinoj, liaj kunlaborantinoj: Ilona Koutny kaj d-ino Zsuzsa Varga-Haszonits.

La fako estas unika en tio, ke ĝi donas samvaloran diplomon kiel aliaj fakoj de la universitato kaj ofertas kompletan esperantologian studtemaron por kvar jaroj. La studoj inkluzivas, krom la lingvoinstruado, priskriban gramatikon, literaturon, movadhistorion, metodologion, interlingvistikon kaj temojn de la ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. Tiel ĝi estas integra parto de la katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, en kies kadro ĝi funkcias. Eblas ankaŭ doktoriĝi pri esperantologio.

Nuntempe krom la 13 tagaj studentoj ankaŭ 13 korespondaj studentoj partoprenas 3-jaran studprogramon. Tie la posedo de universitata diplomo kaj la scio de Esperanto estas antaŭkondiĉoj.

La memstara laboro de studentoj okazas en scienca studenta rondo — temas ĉefe pri pedagogio kaj lingvistiko,



kaj ekde nun sub la gvido de Ilona Koutny ankaŭ pri komputilaj aplikoj (ekz. uzo de sintezita parolo en instruado, problemoj de maŝina tradukado). Aperadas studenta revuo *Opus Nigrum*, redaktata de István Ertl (ankaŭ redaktoro de *Internacia pedagogia revuo* [IPR]).

Eksterlandaj studentoj estas bonvenaj en la fako laŭ la kondiĉoj de la universitato: 1) Studentoj, kiuj venas laŭ interŝtataj kontraktoj kaj ricevas stipendion, povas alpreni esperantologion kiel suplementan fakon; 2) hungaroj loĝantaj en la najbaraj landoj rajtas studi senpage, sed devas prizorgi sin mem; 3) ĉiuj aliaj eksterlandanoj devas pagi por la studado.

La studadon povas kompletigi la vigla esperantista vivo en Budapeŝto (kulturaj kaj sciencaj aranĝoj), eldonaĵoj kaj riĉa librokolekto.

Por pluaj informoj bv. turni vin al Esperanto-fako, ELTE, Budapeŝto, Pf. 107, H-1363, Hungario.

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Limigi la limigojn

Wolfgang Gunther plendis (reagoj, jan. 88) pri la necentreco de Bjali-stoko. Por internacia centro tio estas ĝuste avantaĝo, ĉar eduka centro plej efikos, se ĝi kuntiros homojn el mal-samaj kulturoj kaj lingvoj. Tiel kreskas la neceso kaj motivo paroli Esperanton. La de d-ro Gunther citita KCE estas mem eminenta ekzemplo de malcentrismo: ĝi situas tiel malcentre, ke ĝi preskaŭ falas en najbaran landon...

Dubeblas ĉu la bjalistoka centro signife forprenos rimedojn de aliaj centroj; ĝi altiros rimedojn, kiujn ne povus atingi aliaj centroj. Tia centro servos al miloj, por kiuj vizito al KCE kaj similaj okcidentaj centroj estas nur fantazia revo. Sciu, ke soclandano ricevas svisan vizon nur per montro de cent svisaj frankoj por ĉiu restada tago; KCE mem povas inviti preleganton ajn-eminentan el orienta Eŭropo nur post depono de okmilfranka kaŭcio.

Se Wolfgang insistas svingi la etiketon "cenzuro", li tamen ne tiel facilanime kaj unuflanke ĝin gluu. Limigoj ĉiaj troviĝas ĉie, prefere per malcentrismo kaj mozaikeco ni limigu la limigojn.

Stefan MacGill (Hungario)

Lingvo de la scienco

En la decembra numero mi legis reagon de s-ro Mee el Britio, kiu koleris pri la alvoko de Wera Blanke ke tiuj homoj, kiuj interesiĝas pri terminologia laboro, nepre lernu ankaŭ la anglan.

Mi ne lin komprenas, kaj mi volus eĉ aldoni ke ankaŭ sciencistoj kiuj ne volas okupiĝi pri terminologio lernu la anglan (aŭ alian gravan etnolingvon), ĉar ni esperantistoj-sciencistoj ne estu iu kliketo kiu tute ne rilatas al la multe pli granda grupo de neesperantistaj sciencistoj. Kiel povus tiuj esperantistoj, se ili parolus nur Esperanton, iel science labori?

Rob Keetlaer (Nederlando)

Pli ĝuste...

En sia memorartikolo pri prof. Lapenna, s-ro Ulrich Lins listigis en la "iom heterogena rondo de aktivuloj", kiuj zorgis pri ŝanĝo en la prezidanteco de UEA en 1974, ankaŭ "eksestraranojn de UEA". Tamen klopodis pri nova prezidanto estraranoj ne nur eksaj sed aktivaj. Mi mem, kiel estrarano rekte elektita de la Komitato, transprenis la devon batali por bonigoj, kiam rezonado kaj konscienco tion postulis. Same agis siatempe ankaŭ la kolegoj de la estraro, kiuj poste restis en ĝi.

Werner Bormann (FR Germanio)

Leginte la aprilan numeron mi bedaŭrinde devas konstati, ke vi kaŝas al la legantoj mian personan konatecon kun Lapenna kaj donis — per neindikataj ellaso kaj ŝanĝo de vortoj — al mia teksto alian karakteron, daŭrigante plue senbazan preparolon de iaj neprecizigitaj "personaj motivoj".

Kompreneble mi devas noti ke la revuo *Esperanto* limigas la liberan esprimadon de pensoj tiel, ke ĝi estu konforma kun la aktuala politiko de la regantoj de la Asocio (kvazaŭ laŭ la modelo de la t.n. "glasnost"). Kiel simpla individua membro de UEA dum la periodoj 1956-74 kaj 1982-88 mi povas nur esperi pri relativaj plibonigoj de la tiurilata situacio.

Bonvole legu la lastan parton de mia aprila letero jene:
..la homaj rajtoj ..en 1974 en Hamburgo li decidis, ke lia agado por la menciitaj idealoj plej bone okazu en la Esperanto-movado ekster UEA. Li tiurilate bazis sin sur sia prijuĝo pri la karaktero de la "iom heterogena rondo", inkluzive de ĉiuj komitatanoj de orienta Eŭropo (p.26). Oni povas diskuti, ĉu tiri tiun konsekvencon estis ĝuste aŭ ne, sed oni ne rajtas dubi, ke en plena honesteco li agis sole laŭ sia takso de la intereso de la Esperanto-movado...

Sven Ziegler (Danlando)

Red.: D-ron Bormann trafis simpla komposta eraro: temas pri (eks)estraranoj. Pri la akuzo de s-ro Ziegler, niaj legantoj mem scios juĝi... Kape de ĉi tiu rubriko staras la averto, ke ni rezervas la rajton mallongigi leterojn (kiel normalas en leteropaĝoj tra la mondo), kaj tio fakte okazas preskaŭ ĉiuletere. Do ne ŝajnas necese tuj protesti pri cenzuro...

Ankoraŭ pri MPK...

Mi bonvenigas tiajn kontaktojn kun organizaĵoj, kies fundamenta celo (ĉi tie: paco) kongruas kun grava celo de ni. Se tia organizaĵo havas difineblan politikan kolor-nuancon, mi ne tuj timas pro la neŭtraleco de la Asocio. Ŝnurdanci inter partipolitiko unuflanke kaj apartiĝema sekteco aliflanke evidente eblas, ĉar UEA ŝajnas eviti mispaŝojn ĝis nun. Kontentige ankaŭ, ke oni ne provis (kiom mi rimarkis) aktualigi en moderigita formo la tezon pri Esperanto kiel la ŝlosilo al monda paco...

Gary Mickle (okcidenta Berlino)

Certe gravas, ke la ordinara publika imago de MPK estas, ke ĝi aktivigas laŭ politike tre socialismaj/komunismaj vidpunktoj. Laŭ la interkonsento UEA devas kunlabori kun MPK pri certaj aktivecoj en publika kadro kaj helpi pri distribuo de ĝiaj materialoj. Tio neeviteble signifas, ke oni publike identigas la ideojn de MPK kun esenca parto de la ideoj de UEA.

Estas prave, ke tre indas la celo atingi la uzon de Esperanto ĉe grandaj kaj influrikaj organizaĵoj, sed ne per ĉiu ajn rimedo. Organize oni povas kunlabori kun preskaŭ ĉiuj — ankaŭ kun MPK — kiam temas pri unuopaj, klare difinitaj punktoj, kaj teme kaj tempodaŭre, sed tie ĉi temas pri ĝenerala publika kunlaboro. Mi subtenas la vidpunktojn de s-ro Svane kaj sugestas, ke UEA ŝanĝu la formon de kunlaboro kun Monda Pac-Konsilio.

P. Bo Larsen (Danlando)

Nekrologoj

Frato Arni DECORTE (1914-1987) forpasis la 17an de decembro en Leuven, Belgio. Li estis dumviva membro kaj delegito de UEA, kaj tradukis-eldonis diversajn verkojn pri kapucenismo en Esperanto.

Marjorie DUNCAN (1912-1988), dumviva membro de UEA kaj delegito en Manly, Aŭstralio, forpasis tie la 13an de januaro. De pli ol 25 jaroj ŝi aktivis kiel instruanto kaj organizanto en la loka kaj landa movadoj.

F-ino A.C. FOHREN (1897-1988), membro de UEA de post 1948, forpasis la 3an de februaro en Roterdamo.

D-ro Tim EINIHOVICI (1895-1988), delegito kaj fakdelegito pri medicino en Perth, Aŭstralio, mortis tie la 7an de marto. Li estis fervora disvastiganto de Esperanto, regula kontribuanto

al *Internacia medicina revuo* kaj foje aktoro ĉe la aŭstraliaj Esperanto-kongresoj.

Johannes JÜSTRICH (1907-1988), delegito kaj fakdelegito pri fervojoj, mortis en St. Gallen, Svislando.

Kazimierz MALYCHA (1900-1988), esperantisto de 1920 kaj honora membro de Pola Esperanto-Asocio, forpasis la 25an de marto en Bydgoszcz. En la periodo 1955-1985 li aperigis ĉ. 10000 noticojn pri Esperanto en *Ilustrowany Kurier Polski*, la organo de la pola Demokrata Partio, kies vicĉefredaktoro li estis; li krome aktivis diverspostene en la landa movado kaj en MEM.

Lajos PUSZTAI, radiospecialisto kiu iniciatis la Esperanto-elsendojn de Radio Budapest en la sesdekaj jaroj, mortis la 16an de januaro 1988.

Ralph MURPHY (1938-1987), dumviva membro de UEA kaj ELNA, mortis la 15an de aŭgusto pasintjare post reveno de Varsovio. Li estis delegito en Boston, poste en Port Charlotte, kaj fakdelegito pri turismo.


Louis OBRECIÁN (1899-1988), delegito en Homer City, Pensilvanio, Usono, mortis tie la 20an de februaro. Li estis entuziasma filatelisto kiu fondis la iaman Internacian Klubon de Esperantaĵ-Kolektantoj.

TANG Xun-an (1911-1988) forpasis la 30an de januaro en Pekino. Esperantisto de post 1928, li faris multon por antaŭenigi la pekinan movadon dum duona jarcento.

Hienrich WIENERS (1900-1988), dumviva membro de UEA, forpasis la 30an de aprilo en Lahr, FR Germanio.

D-ro Isamu YAMAGA (1905-1987), delegito en Otaru, Japanio, mortis la 6an de junio 1987. Li estis fakdelegito pri medicino kaj multjara subtenanto de UEA kaj UMEA.

William John Downes (1892-1987)



La 29an de decembro, 1987, forpasis en Kembriĝo pastro William John Downes, membro de la Akademio de Esperanto de post 1950, aktiva instruisto kaj kontribuinto al Kristana Esperantista Ligo Internacia. Profesie li pasigis 35 jarojn kiel profesoro pri mondreligioj kaj la bibliaj lingvoj ĉe la Universitato de Bristol, kie li ankaŭ estis administristo de teologia kolegio. Sian fakan scion li uzis por traduki la Apokrifajn Librojn de la Biblio en Esperanton (la tradukoj aperis en *Dia regno*). Li ankaŭ tradukis kaj originale verkis himnojn (kunred. *Adoru kantante* [1971]), ofte gvidis Esperantajn ĥorojn kaj estis populara predikanto ĉe internaciaj kongresoj. Dum 20 jaroj li estis sekretario de la korespondaj kursoj de Brita Esperanto-Asocio; preskaŭ same longe li estis Ekzamenisto pri Esperanto ĉe la Reĝa Societo de la Artoj. Liaj spertoj rezultigis la lernolibron *Esperanto, The International Language* (1982).

Ueyama Masao (1910-1988)

La poeto kaj novelisto UHEYAMA Masao forpasis pasintfebruare en Simonoseki, Japanio. Li estis unu el la literaturaj korifeoj de la japana Esperantomovado, kelkfoje premiita en la Belartaj Konkursoj kaj aparte fama kiel hajkisto (*Japana variacio* [1978] kaj *Hajka antologio* [1981], kunred. kun Miyamoto Masao). Li aŭtoris sola la poemaron *Por forviŝi la memoron pri ŝi* (1974), la novelkolektojn *Ne grimacu* (1967), *Pardonon!* (1970) kaj *Mi amas...* (1977) kaj tradukon de la historia romano *Kristo el bronzo* de Nagayo Yosio (1969). Koncerne la japanan movadon, eble plej influa estis lia kontribuado al la beletra revuo *L'omnibuso* de 1964 ĝis 1980, per kiu li edukis kaj kuraĝigis novan generacion de verkistoj.



TESTAMENTI

Kvankam skribi testamenton estas iom malagrabla tasko, estas tre grave ke tiuj, kiuj eventuale ŝatus tiel helpi UEA, efektive faru tion. Estas jure eble en ĉiu lando de la mondo testamenti al UEA same kiel al nederlandano. Kompreneble ne necesas informi la Asocion pri tio, kvankam tia informo restus strikte konfidenca; ni cetere ĉiam pretas konsili pri la plej bona maniero aranĝi siajn aferojn por eviti impostojn aŭ aliajn komplikaĵojn.



**73a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Roterdamo (Nederlando),
23a — 30a de julio 1988.
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando**

Aliĝoj kaj kotizoj: Post la giganta Kongreso en Varsovio pasintjare, ni ne atendis amasan partoprenon en la ĉi-jara UK. Tamen, ni nun frontas pli ol 2 000 partoprenantojn en la 73a UK en Roterdamo. Se vi planas aliĝi al la Kongreso, bonvolu fari tion kiel eble malplej lastmomente. Tiamaniere vi helpas ne nur al la organizantoj, sed ĉefe al vi mem, ĉar nur tiel vi povos certi, ke ni havos la necesan tempon okupiĝi pri viaj mendoj kaj deziroj ĝustatempe. Bonvolu atenti, ke ekde la 15a de majo validas novaj pli altaj aliĝkotizoj: individua membro de UEA — 210 guldenoj; ne-membro — 245; kunulo de membro, junulo, handikapulo — 140; kunulo de ne-membro, junulo ne-membro, handikapulo ne-membro — 175 gld. La aliĝintoj el la orienteŭropaj kaj triamondaj landoj pagas duonon de tiuj kotizoj. Por tiuj, kiuj ne povas partopreni la tutan kongresan semajnon, estos ebleco aĉeti unutagajn kartojn, kiuj kostos 35 gld.

Dua bulteno: Tiu 44-paĝa broŝuro kun ĉiuj bazaj informoj kaj la necesaj mendiloj aperis antaŭ pluraj semajnoj kaj distribuiĝis al ĉiuj aliĝintoj. Kompreneble, la novaj aliĝintoj ricevos ĝin aerpoŝte tuj post la pago de la aliĝo.

Ekskursoj: Montriĝas, ke pluraj kongresanoj preteratentis la fakton, ke ĉiuj tuttagaj ekskursoj okazos en la sama tago (merkredo, la 27a de julio) kaj ke do eblas elekti nur unu el tiuj ekskursoj.

Kampadejo: En la Dua Bulteno aperis erara adreso de la kampadejo (tiu de ĝia administranto), pro kio ni pardonpetas. La ĝusta adreso estas: Kampadejo Kanaalweg, Kanaalweg 84, 3041 JE Rotterdam; telefono: (010) 415 97 72.

Simpozio okaze de la 80-jara jubileo de UEA: Vi havas apartan kialon veni al la Kongreso ĝustatempe, ĉar grava programero okazos jam en sabato la 23a de julio. En tiu tago, de la 09h00 ĝis la 15h00 okazos simpozio pri la temo: "UEA — al nova strategio por nova jardeko". La programo de la simpozio antaŭvidas aron da koncizaj referaĵoj kaj diskutojn, tiel en apartaj laborgrupoj kiel en la pleno.

Komitato: La Komitato de UEA kunsidos ekster la kadroj de la kongresa semajno. La unua kunsido okazos sabaton, la 23an de julio je la 15h30, en la kongresejo. Ĝin sekvas aparta akcepto por la Komitato en la CO de UEA. La ĉefa parto de la komitataj laboroj disvolviĝos en la kunsidoj post la fermo de la Kongreso, la 30an kaj 31an de julio (ĝis la 15h00).

Prelegoj pri Nederlando: Aldone al tute nova ero en la kongresa programo — vizitoj al entreprenoj — pri kiu ni skribis en la antaŭa komunikilo, la 73a UK liveros al vi plian eblecon konatiĝi kun la kongresa lando. Temas pri serio de kvin prelegoj, kiuj koncize traktos diversajn faktojn de la nederlanda politika kaj socia vivo. Krome, okazos

ankaŭ la tradicia kurso de la kongreslanda lingvo — "La nederlanda eksprese".

Tago de la Paco: Tiu tradicia ero de la kongresa programo okazos la 28an de julio kaj havos la temon: "Paco, ekologio, socia justeco". La organizanto de la programo, s-ro Yosimi Umeda, bonvenigas proponojn pri paroladoj kaj aŭd-vidaj prezentoj (vd. la ĉi-suban alvokon).

Loĝado: Bonvolu atenti, ke ne plu restas lokoj en la plej malaltaj hotelkategorioj, kvankam ja en la junulargastejo kaj komuna loĝejo. Vi sendube rimarkis, ke la hotelprezoj por la kongresa semajno estas vere moderaj. Bonvolu utiligi la okazon kaj elekti komfortan hotelon kontraŭ pagebla prezo.

Alvoko:

Tago de la Paco

La Tago de la Paco dum la roterdama UK pritraktos la temon "Paco, ekologio, socia justeco". Tiu, kiu volas elpaŝi kun siaj starpunktoj pri la temo, anoncu sin kun resumo de maksimume 10-minuta parolado al la suba adreso de la gvidanto:

Yosimi Umeda

2-15-10 Aobadai, Meguro-ku
Tôkyô 153, Japanio.

Proponoj kaj sugestoj pri rilataj prezentaĵoj, ekz. ekspozicieto, filmoj ks. same bonvenas.

Urba trafiko: Eĉ sen nia emfazo, multaj kongresanoj jam mendis semajnajn biletojn por la urba trafiko. Tio estas tre konsilinda al ĉiuj partoprenantoj, ĉar la prezo de tiaj biletoj estas malalta kaj certe prezentiĝos dum la semajno pluraj okazoj utiligi la bonan kaj fidindan publikan transporton de Roterdamo.

Aŭkcio: Ni denove revenos al tiu populara programero en Roterdamo. Oni aŭkcios dekojn da raraj kaj valoraj libroj, bildoj, dokumentoj, objektoj ktp. Se vi havas aŭcieblan donacon, ne hezitu proponi ĝin al la konstanta adreso de la Kongreso. Kiel kutime, la sumo de la vendoj en la aŭkcio iros al unu el la bonfaraj fondaĵoj de UEA. Se vi ne havas donacon por la aŭkcio, gardu iom da mono por elspezi ĝin tie! La aŭkcion gvidos Humphrey Tonkin.

Statistiko: Ĝis la fino de aprilo aliĝis preskaŭ 1 700 kongresanoj el 60 landoj. Ofte atendeble, tamen foje surprize, plej multaj kongresanoj venas el jenaj landoj: Nederlando 277, Pollando 179, FR Germanio 161, Francio 126, Italio 76, Britio 76, Svedio 73, Belgio 69, Hungario 68, Japanio 63, Jugoslavio 58, Usono 51, Finnlando 48, Irano 45, Bulgario 39, Hispanio 37, Svislando 30, Norvegio 17, Ĉinio 16, Brazilo 14, ktp...

Animoskuas, kun mankoj

Nederlanda antologio. Antologio de nederlanda poezio post la mezepoko en Esperanta traduko, red. Gerrit Berveling, Wouter Pilger kaj Willem Verloren van Themaat. Den Haag: Nederlanda Esperanto-Asocio, 1987. 118p. 23cm. Prezo: 15,90 gld.

Inter la antologioj, kiuj malfermas al la esperantistaro naciajn literaturojn, ĉi tiu estas bonvena, precipe ĉar manuskripto de antaŭa antologio pereis dum la milito. Ĝi ne enhavas prozon, kaj mankas al ĝi la mezepoka poezio, en kiu elstaras la 13a-jarcento poetino Hadewych, kiu pri-kantis mistikan amon en trobarecaj strofoj. Tamen ĝi enhavas la du florperiodojn de la nederlanda poezio: la 17a jarcento kaj la duonjarcento post 1880.

La enkonduko donas utilan bildon de la nederlanda poezio el, ni diru, oficiala vidpunkto. Estas interese al mi, nederlanda poeziamanto, ke nomoj antaŭ nelonge gravaj nun eĉ ne estas menciitaj. Instruante literaturon en lernejo, mi rimarkis, ke gejunuloj ofte preferas klasikajn poemojn al la lasta avangardaĵo. Poemo de Hooft, Perk, Boutens ofte elvokis surprizreagon "Sed tio estas bela!". Tian reagon, laŭ mi, celu poemtradukanto kaj redaktanto de antologio, kies tasko ja ne estas instrui literaturhistorion, sed ebligi la animskuan sperton, kiu estas renkonto kun vera poemo. Pro tio mi preferus vidi pli da poemoj el la du

glorperiodoj, pli de Bredero (1585-1618) ekzemple, kaj de Leopold (1865-1925), ambaŭ reprezentitaj per nur unu poemo, anstataŭ kelkaj el la lastatempaj efemeraĵoj.

Krom la "Preĝo al la socialismo" de Henriette Roland Holst (1869-1952) la elekto de la poemoj apenaŭ rilatas al la socia kaj politika vivo de la lando. Nek poetoj, nek poemoj naskiĝas en vakuo; la granda poeto Vondel (1587-1679) pasie partoprenis siatempan politikon. Mi bedaŭras malhavi tradukon de la poemo, en kiu li protestis kontraŭ la ekzekuto pro falsa akuzo de la 70-jara Oldenbarneveldt. Krome, leganto apenaŭ suspektus, ke Nederlando suferis kvinjaran nazian okupacion, kaj en tiu tempo poemoj, pli kaj malpli bonaj, disvastiĝis sekrete kaj estis avide legataj de homoj, kiuj nun ne malfermus poezilibron.

Pri la tradukoj, kelkaj estas tre bonaj. Mi vere ĝuis, por menciigi nur kelkajn, "Konsolo al G. Vossius" de Vondel (tr. A. Samyn), "Irisa" de Perk (tr. J. Holtzer), "Post sunsubiro ĉe la mar" de F. Van Eeden (tr. Rejna de Jong). Tre plaĉas al mi "La kanto de Baldur" el "Majo" de Gorter (1864-1927) en traduko de Verloren van Themaat, sed mi ne povas laŭdi lian tradukon de "La maro" de Kloos. Tamen, mi devas konfesi, ke mi plurfoje vane provis traduki tiun faman soneton, kiu venas en mian kapon kiam ajn mi alfrontas la maron. Traduki poemon ne estas ludo; oni metas piedon sur sanktan teron, kaj mi salutas tiujn, kiuj ne timis la taskon kaj ofte bone sukcesis.

Albert Goodheir (Skotlando)

Jen kelkaj kompletigoj al la marta Kalendaro:

MAJO: 20-23: **66a Germana Esperanto-Kongreso**, Duisburg, FRG (Ursula Felhölder, Lathener Str. 4, D-4500 Osnabrück; temo "per Esperanto por Eŭropo"); 27-29: **31a Kultura Semajnfino**, Kardinal-Wendel-Haus, Homburg/Saar, FRG (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt; gastparolanto M. Duc Goninaz)

JULIO: 01-08: **Somera Esperanto-Universitato**, Gyula, Hungario (SEU, 48-as u. 11, H-5700 Gyula; ld. majo 31); 02-15: **Somera Esperanto-Lernejo**, Poprad, Ĉeĥoslovakio (Slovaka Esperanto-Asocio, Kleriga Centro, Sobotské nám. 6, CS-05801 Poprad); 03-10: **2a Somera Lernejo pri Komputiko**, Bieuzy-les-Eaux, Francio (Esperanto, 60 allée de la Renaudiere, F-35510 Cesson-Sevigne; temo "enkonduko al dizajno kaj enplantado de programaroj"); 16-22: **Turisma Semajno**, Slovaka Paradizo (Spišská Nová Ves), Ĉeĥoslovakio (Peter Pavúk, Jilemnického 17, CS-05201 Spišská Nová Ves); 31-07: **Internacia Junulara Renkontiĝo**, Rastatt, FRG (Simone Fischer, Steinmauerner Str. 22, D-7750 Rastatt; temo "naciismo-internaciismo-sennaciismo en Eŭropo")

AŬGUSTO: 13-20: **Somera Esperanto-Familia Tendaro**, Feldberg, GDR (SEFT '88, p/a Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13/0202, DDR-2000 Neubrandenburg);

25-30: **1-a Renkontiĝo de Instruistoj pri Lingvoj el Okcidenta Eŭropo**, Nantes, Francio (Edmond Ludwig, 26 route de la Schlucht, Stosswehr, F-68140 Munster)

SEPTEMBRO: 12-18: **Vinbera Esperantista Renkontiĝo**, Zielona Góra, Pollando (Esperanto-PEA, pk. 43, PL-65-958 Zielona Góra 8); 16-19: **5a Konferenco de Kolektivo Esperantista Komunista**, Vordernberg, Aŭstrio (Franz Schick, Enzstr. 11, A-8704 Leoben); 23-25: **Esperanta Internacia Amikeca Kuniĝo**, Aylesford, Maidstone, Anglio (Bertram Russell, 103 South Coast Road, Peacehaven, Newhaven, East Sussex, Britio BN9 8QU)

Kalendaro

Jen, krome, kelkaj atentigoj pri unuopaj aranĝoj.

La **Forumo de Esperanto-kulturo** en Varsovio, planita por 10-12 junio, nun okazos la 4an kaj 5an de junio. Oni antaŭvidas diskutojn, koncerton, dramon prezenton de *Sinjoro Tadeo*, surscenejigon de *Halka*, seminarion pri Grabowski ktp ktp. Detaloj haveblas de PEA, ul. Krucza 38-42, PL-00-512 Warszawa 1, Pollando.

Sub kunaŭspicio de ILEI kaj UEA okazos en Kultura Centro Esperantista (La

Chaux-de-Fonds, Svislando) **Intensiva pedagogia-metodika kurso**, de la 29a de junio ĝis la 13a de julio. La prezo de la tuta aranĝo (manĝoj, dormloko ktp) estas inter SF 810 kaj SF 1080, kun reduktio por studentoj. Kursfine oni ekzameniĝos por la internacia instru-atestilo. Aliĝu tuj ĉe KCE, Pf. 771, La Chaux-de-Fonds.

Tiuj, kiuj maltrafis la tre sukcesan **Internacian Junularan Semajnon** en Szeged, Hungario pasintjare (vd. *Esperanto* 1987/p.181), trafu la ĉi-jaran! (10-16 julio): HEJ, Pk. 193, H-1368 Budapest.

TEJO organizas kunlabore kun la Internacia Unuiĝo de Studentoj **internacian konferencon** pri la Nova Internacia Informa kaj Komunika Ordo en Blaricum/Huizen, Nederlando, de la 4a ĝis la 7a de novembro. Oni antaŭvidas kvindekda partoprenantoj. Interesataj junaj esperantistoj anoncu sin al TEJO en Roterdamo.

Kuba Esperanto-Asocio eketendas siajn internaciajn flugilojn per **ESPERANTO '88: Internacia Konferenco por la Evoluoj de Esperanto en Iberoameriko**, de la 30a de novembro ĝis la 2a de decembro en Havano. La programo estos varia, kun eroj distraĵaj kaj seriozaj; kunlaboros elstaraj prelegantoj. Por elprovi la organizan kapablon de la UK-gastigontoj en 1990, petu detalojn ĉe KEA, Pf. 2018, La Habana 2.

Laste aperis...

Aleo aŭtuna, L. Ligeza. Krakovo: la aŭtoro, 1987. 32p. 20cm. ISBN 83 85033 02 5. Originalaj poemoj. Prezo: 4,50 gld.

Aŭdu kaj lernu. Lernolibro 1: Elementa, S. Chaves (1929-). Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto k. Fundação Getúlio Vargas, 1984. 96p. Ilus. 23cm. Legolibro por en- kaj eksterklasa lernado. Prezo: 7,80 gld.

Centjara Esperanto, div. aŭtoroj, red. Geraldo Mattos. Chapecó: Fonto, 1987. 240p. 21cm. 16 studoj de akademianoj pri diversaj aspektoj de la lingvo. Prezo: 24,00 gld.

Communication internationale et avenir des langues et des parlers en Europe, A. Chiti-Batelli. Nice: Presses d'Europe, 1987. 198p. 24cm. Analizo de la lingva evoluo en Eŭropo, kun favora konkludo pri Esperanto. Prezo: 25,20 gld.

Didaktika kantarono 1, 2 kaj 3, S. Chaves (1929-). Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto, 1984. 23 + 27 + 47p. 23cm. Tri kantokajeroj didaktikaj. Prezo: 1 kaj 2, po 4,80; 3, 6,30 gld.

Esperanto — lingvo de la natursciencoj kaj tekniko 1887-1986, O. Haszpra. Rotterdam: UEA, 1988. 16p. 21cm. ISSN 0165-2524. Esperanto-dokumento 25E. Kun kronologio. Prezo: 3,-gld.

Esperanto-Türkçe Sözlük, Bekir Karayel. Büyükesat/Ankara: la aŭtoro, 1987. 224p. 16cm. Unudirekta Esperanto-turka vortaro. Prezo: 9,90 gld.

Fenomeno Esperanto, La, William Auld (1924-). Rotterdam: UEA, 1988. 120p. 21cm. Ilus. ISBN 92 9017 037 9. Baza informverko pri la lingvo kaj movado. Prezo: 18,00 gld.



Grodan. Snabbkurs i esperanto — det internationella språket. Börje Lund, Bertil Wennergren kaj La Ranetoj. Stockholm: La Ranetoj, 1987. 135p. 30cm. Ilus. ISBN 91 970515 2 7. Prezo: 24,30 gld.

Í diethnis glóssa Esperanto. Methodos — didaskalias — auto-didaskalias. Spiros Sarafian. Ateno: la aŭtoro, 1987. 672p. 24cm. Kompleta greka lernolibro de Esperanto. Prezo: 73,50 gld.

Interlinguistica Tartuensis IV: Voprosy obščej i ĉastnoj interlingvistiki. Div. aŭtoroj. Tartu: Tartua ŝtata universitato, 1987. 160p. 22cm. Kvara ero en notinda serio; precipe ruslingva. Du sekcioj: "Tipologio kaj lingvokontaktoj" kaj "El interlingvistika historio". Prezo: 18,00 gld.

Kantu kaj lernu. Legolibro, S. Chaves (1929-). Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto k. Fundação Getúlio Vargas, 1983.

40p. 21cm. Ilus. Prezo: 6,60 gld. *Vd. ankaŭ la sekvan eron kaj sub "Diversaĵoj"*.

Kantu kaj lernu (Cante e aprenda). Gvidlibro (Livro-guia), S. Chaves (1929-). Rio de Janeiro: Liga Brasileira de Esperanto k. Fundação Getúlio Vargas, 1983. 48p. 21cm. Portugallingva gvidilo pri la kurso "Kantu kaj lernu". Prezo: 6,60 gld.

Koko kantisto kokerikisto, Petras Cvirka. El la litova trad. A. Vaitilavičius. Vilnius: Vyturys, 1987. 36p. 26cm. Kolorilus. Ĉarmaj porinfanaj fabeloj, bele ilustritaj. Prezo: 6,00 gld.

Linguistische Aspekte der Plansprache Esperanto (1978), J.C. Wells (1939-). El Esperanto trad. Günter Becker. Saarbrücken: Saarländischer Esperanto-Bund, 1987. 101p. 20cm. Fondaĵo Günter Becker n-ro 1. Germana traduko de *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Prezo: 24,90 gld.

"O" kaj aliaj rakontoj, D. Mikuličić. El la serbokroata trad. J. Zarković. Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1988. 216p. 20cm. Dek tri sciencfikciaj rakontoj. Prezo: 13,20 gld.

Profeto, La (1962), G. Ĥalil Ĥibrano (1883-1931). El la angla trad. R.O. Stone. Chapecó: Fonto, 1987. 96p. 21cm. Ilus. Fontoserio n-ro 18. Ĉefverko de la influa libana verkisto, t.n. "prozpoemo". Prezo: 6,00 gld.

Psikologiaj reagoj al Esperanto, C. Piron (1931-). Rotterdam: UEA, 1988. 14p. 21cm. ISSN 0165-2524. Esperanto-dokumento 26E. Prezo: 3,00 gld.

Rhône-Alpes, Espéranto et espérantistes. Des origines a nos jours, A. Vedrine. Lyon: Centre Espéranto de la région de Lyon, 1988. 260p. 30cm. Historio de la movado en regiono de Francio. Prezo: 45,00 gld.

Trifolio: Versaĵoj trilingve. Gerrit Berveling. Vlaardingen: VoKo, 1988. 48p. 21cm. Broŝ. Mimeo. Originalaj poemoj en Esperanto, la latina kaj la nederlanda. Prezo: 6,00 gld.

Unua rendezuo, La. Div. aŭtoroj. Ukraina respublika filio de ASE, 1985. 48p. 20cm. Broŝ. Mimeo. Legolibro kun amuzaj tekstoj tradukitaj el la rusa. Prezo: 4,50 gld.

Via dua lingvo; Esperanton keskustelukurssi. Veli Kolari. Helsinki: Oy Mendoservo Ak, 1988 (3a eld.). 102p. 21cm. Ilus. Prezo: 18,00 gld.

Vivprincip' en politik'. Kritik' de l' kritikantoj de la du kontraŭaj kampoj. Jeremi Gishron. Jerusalem: Eldonejo Sivron, 1987. 6p. 15cm. Broŝ. Kritiko de ideoj de Markso kaj Maŭ pri religio. Prezo: 2,40 gld.

Volapükabled. Faka revuo pri volapükologio, n-roj 1-3. Red. Reinhard Haupenthal. Scheidt: Artur E. Iltis, 1985-. Po 20p. 21cm. ISSN 0179 1931. Prezo: po 12,60 gld.

Diversaĵoj

Disko: La Bufo, S. Chaves (1929-), kantas J. Castro k. F. Fenati. Rio de Janeiro: Sono-Viso. Jaro neindikita. 17cm, duflanka. Kvar kantoj. Prezo: 4,80 gld.

Diskoj: Kantu kaj lernu 2 kaj 3, S. Chaves. Rio de Janeiro: Sono-Viso k. Brazila Esperanto-Ligo. Jaro neindikita. 17cm, duflankaj. Po 5-7 kantoj. Prezo: po 4,80 gld.

Kasedo: Kantu kaj lernu, S. Chaves. Rio de Janeiro: Sono-Viso k. Brazila Esperanto-Ligo. Jaro neindikita. 20 kantoj plu frazoj kaj dialogoj. Prezo: 13,50 gld.

Poŝtkartoj: Orfiŝoj, Ĉina Esperanto-Ligo, 1987. Po dek. Prezo: 2,70 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Brazilo:** Semajna gazeto *O Pharol* (La Lumturo), eldonata en Petrolina, Pernambuco, Brazilo, publikigas multajn E-novaĵojn en sia junulara rubriko kaj ankaŭ en aparta rubriko: "Esperanto — la ponto". Tiu rubriko bezonas kunlaboron el la tuta mondo. Skribu en la portugala aŭ en Esperanto. Adreso: Hilmar Ilton Santana Pereira, Caixa postal 205, BR-45600 Itabuna, Bahia.

Ĉefdelegito por Brazilo Jorge Das Neves gastis en Petrolina (ŝtato Pernambuco) kie li trifoje prelegis kaj propagandis pri UEA kaj E-o, fine de decembro. Rezultas el tio ke akademi-ano Sylla Chaves instruos en tiu regiono laŭ invito de la du urbestroj.

● **Ĉeĥoslovakio:** En n-ro 10/1987 (1025) de *Typografia*, ĉeĥoslovaka fakgazeto de la grafika industrio, oni aperigis artikolon de inĝ. Ota Kořínek "Esperanto kaj preso" (Esperanto a tisk), kiu traktas interalie la presadon de la supersignoj.

● **Ebura Bordo:** La 30-an de januaro oni okazigis konferencon pri E-o en la nacia biblioteko en Abiĝano. Prelegis la organizantoj: Gérard Paing (Francio), Kouablan Kouassi Antoine kaj Darga Antoine. Oni intervjuis ilin por du abiĝanaj ĵurnaloj.

● **Francio:** Franca sindikata revuo *La vie ouvrière* (Laborista vivo), eldonata en ĉ. 100 000 ekzempleroj, aperigis ampleksan kaj informriĉan tripaĝan artikolon pri Esperanto dank' al la perado de Esperantista Laborista Federacio.

● **Germanio:** La 1-an de marto 1988 eklaboris "Oficejo por eŭropa interkompreniĝo" (Büro Europa Verständigung). Ĉiujn kostojn por la kvar stabanoj kovras ŝtataj kaj urbaj instancoj en Hamburgo. La iniciatinto kaj jura portanto estas la Societo por Internacia Lingvo (prez. d-ro Werner Bormann, adreso en la Jarlibro). La oficejo celas per Esperanto helpi komunikadon inter instancoj de ĉiuj eŭropaj landoj. Kunlaborantoj bonvenaj.

● **Hungario:** Plian kontribuon al vastiĝanta stoko de hungaraj turismaj informiloj konsistigas laste-aperinta 28-paĝa libreto pri la kuracbanejo de Zalakaros (okcidenta Hungario). La detalan kaj amplekse ilustritan verkon tradukis Tibor Szabadi, de kiu ĝi haveblas ĉe Pf, 66, H-8900 Nagykanizsa.

● **Irano:** Pere de ITC (Irana Tradukcentro), la irana scienc-kultura magazino *Adine* publikigis tradukon de la prelego de Claude Piron "Veti pri Esperanto" kaj ankaŭ kolumnon da informoj pri la nuntempa stato de Esperanto. En la sekva numero (9/2/88) oni raportis pri pozitivaj reagoj al la artikolo.

● **Italio:** S-ino D'Alessandro el Gela (Sicilio) gajnis 69 200 000 da liroj (106 000 guldenojn) dum televida kvizo elsendita de la ĉefa televidstacio italia, respondante al kvin demandoj pri Esperanto. La kanalon "5" (kaj la

kvizon, kiun gvidas la fama prezentisto Mike Bongiorno) spektas meznombre 6,5 milionoj da personoj.

● **Jamajko:** En la lernejo St. Catherine College, ĉiuj studentoj lernas Esperanton kiel pontlingvon al la franca kaj hispana. La vicestro interesiĝas pri stenografiaj sistemoj en E-o kaj scienca (altlernej-nivela) literaturo kiu povus plimotivigi liajn studentojn. Adreso: M. Becker, St. Catherine College, Kitson Town P.A., St. Catherine, Jamajko.

● **Japanio:** En marto ĉesigis sian agadon la Esperanto-klubo de Altlernejo Ikuno, pro manko de heredontaj gvidanto kaj klubanoj. La klubo fondiĝis en 1948 kaj funkciis seninterrompe dum 40 jaroj.

● **Litovio:** En la numero 2(29)-1987 de la almanako de Litova Societo por Amikeco kaj Kultura Kunlaboro kun Eksterlando (eldonita en la lingvoj rusa, angla, franca kaj germana) aperis sespaga artikolo pri la centjariĝo de Esperanto verkita de L. A. Skúpas, prezidanto de la litova sekcio de ASE.



● **Usono:** En la jarkunveno de la prestiĝa usona fakorganizaĵo pri modernaj lingvoj (Modern Languages Association of America, aŭ MLA), la 29an de decembro 1987 en Sanfrancisko, Kalifornio, okazis sesio pri Esperanto. Sub la reĝisorado de Dorothy Holland-Kaupp prelegis d-roj Robert Blaire (prezento de Esperanto kiel "lingua franca", t.e. liglingvo), Amri Wandel (perkomputila instruado) kaj Ian Richmond (foto), kies referaĵo "Tempo kaj spaco en Esperanta prozofikcio" estis aparte profesieca. Kvankam malmultaj instruistoj ĉeestis, la programero aperos en la MLA-revuo, kiun ricevas ĝiaj ĉ. 20 000 membroj.

● **Geologio:** Okaze de la Jubilea Jaro aperis du volumoj de *Geologio internacia*. En Duŝanbe, Taĝikio (Sovetunio) eldoniĝis la sesa volumo, pretigita de la Geologia Instituto de la Akademio de Sciencoj de Taĝikio kaj la geologia sekcio de ISAE. Pri la eldono raportis ankaŭ la respublika partia gazeto en ampleksa artikolo. La sepa volumo aperis en Brazilo, kunlabore inter la geologia fako de la Federacia Universitato de Pernambuko kaj Pernambuka E-Asocio. Ĝi mendeblas ĉe Pernambuka E-Asocio kontraŭ 10 gld, US\$5, 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

● **Infanoj:** "Infanoj ĉirkaŭ la mondo", nove fondita neprofitita korporacio en Usono, celas interkonatigi infanojn en Usono kaj aliaj landoj per Esperanto. Prezidanto Charlotte Kohrs jam iniciatis Esperanto-kurson por 180 infanoj kaj instruistoj en ses elementlernejaj klasoj en Kalifornio. Aperas ankaŭ internacia infana revuo — komence nur sespaĝa kseroksaĵo dulingva. Adreso: Children Around the World, 3876 Belmont Avenue, San Diego CA 92116, Usono.

● **Interlingvistiko:** Anglalingva artikolo "Pri la kaŭzoj de la malkonsentoj en la interlingvistiko", verkita de d-ro W.A. Verloren van Themaat, aperis en la GDR-a fakgazeto *Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung* (Revuo por fonetiko, lingvistiko kaj komunikesploro), n-ro 40/5 (1987), p. 693-704.

TEATRA KONKURSO PLILONGIGITA

La Dua Konkurso por originala teatraĵo de Esperantlingva Verkista Asocio, kies limdato estas anoncita por la fino de aprilo, plilongiĝas tiel ke la limdato por ricevo de la konkursaĵoj estos **la 30a de oktobro 1988**. Ĉiuj aliaj kondiĉoj restas neŝanĝitaj.

Detaloj de la konkurso aperis en la marta numero de *Esperanto*.

● **Instruado:** E-Asocio de Britio modernigis sian malnovan ekzamenan sistemon por licencio de EAB. Kandidatoj povas anonci sin el iu ajn lando (scipovi la anglan lingvon ne necesas) al la komisiito pri ekzamenoj, R. Rossetti (40 Solent Way, Gosport, Hants PO12 2NS).

● **Moderna arto:** "Nula horo" estas grupiĝo de artistoj, sciencistoj kaj simpatiantoj de ĉiu aĝo kiu volas komune okupiĝi pri arto. Ĝi ne havas formalajn kaj hierarkiajn strukturojn kaj baziĝas je meminiciatemo kaj spontaneco. Kontaktadreso: Jan Stanislaw Skorupski, Dorfstr. 57b, D-1000 Berlin kaj Wolfgang Gunther, Schulstr. 7, D-3501 Ahnatal 1, FRG.

● **Pacifismo/Etnismo:** Unione Pacifista Popolare Universale (c.p. 68, 33100 Udine, Italio) invitas ĉiajn etnajn grupojn al Udine por

renkontiĝo inter la 20-a kaj 23-a de oktobro 1988. Grupoj prezentos diversajn programojn propralingve. Oni resumos ĉion en E-o.

● **Terminologio:** La bindita eltaĵpaĵo de *Plena Pekoteko 1985-1986* haveblas kontraŭ US\$8,50 plus \$2 sendokostoj de Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado K0L 1B0. (Vd. *Esperanto* 1986/p.210 por informoj pri Pekoteko.)

● **Turismo:** Laŭ iniciato de Sennacieca Asocio Tutmonda, lanĉiĝis "Amikeca Reto": nova servo kiu celas helpi al pli kleriga turismo per propono de rektaj homaj rilatoj kun diversaj sociaj viziteblecoj, preter la muzeoj kaj panoramoj. Jam post kelkmonata ekzisto la reto enhavas 112 membrojn el 24 landoj. 80-paĝa broŝuro pri ĉiuj detaloj haveblas kontraŭ 25 FRF, kiuj pagas ankaŭ la membrecon. Gérard Rollin, 63 rue de la République, F-37 530 Chargé, Francio (poŝtĉekkonto 1544 95 V La Source).

Esperanto en radio

● **Havano:** Radio Havano Kubo interesiĝas pri regula dissendo en Esperanto, precipe al la Amerikoj kaj Afriko. Por subteni kaj plu kuraĝigi tiun paŝon, skribu petante tiajn elsendojn al Pedro Rojas, Radio Habana Cuba, Apartado 7026, Habana 3, Kubo.

● **Romo:** La Esperanto-redakcio de la Itala Radio (Radio Roma) petas ke ankaŭ tiuj, kiuj volas sed teknike ne povas aŭskulti ilian elsendon (sabate je 20.00 UTC), skribi por raportoj detale pri tio al Radio Roma, Esperanto, CP 320, Centro Corr., I-00100 Roma RM, Italio.

● **Varsovio:** La 4an de aprilo la E-elsendoj de Radio Polonia eniris sian tridekan jaron. De la komenca duonhora taga elsendo, ili kreskis ĝis ses programoj ĉiutage kaj al redaktora stabo, kiu ofte vizitas E-aranĝojn laŭ invito de la organizantoj kaj per raportoj kaj intervjuoj multe kontribuas al la informfluo ene de la movado.

Nuntempe okazas konkurso inter la aŭskultantoj por reagoj pri la progra-

ma kvalito. Aldone al la elsendinformoj en la januara numero de *Esperanto*, notu ke la programo je 19.30 UTC **ne plu okazas**, sed ke komense la elsendo je 05.30 UTC **plilongiĝis** ĝis tuta horo (05.00-06.00 UTC).

● **Zagrebo:** La Esperanto-fako de Radio Zagreb fariĝis 35-jara la 17an de aprilo. Ĝiaj dimanĉaj kvaronhoraj elsendoj nun sumas je 455 horoj; la amasigita materialo por 80% de la programo ampleksas 10 730 tajpitajn foliojn. Komentas Emilija Lapenna, kiu aktivis pri la programo dum ĉiuj 35 jaroj: "Tio, ke nur 11 radiostacioj en la tuta mondo havas konstantan Esperantan programon, estas dika makulo sur la 100-jara jubilea brilo."

● **Maribor:** Loka radiostacio en Maribor, Jugoslavio, dissendas de decembro 1985 la novaĵojn kaj veterprognozon en Esperanto: ĵaŭde je 11.35h loka tempo, MM2, ultramal-longaj ondoj 102.8 MHz; aŭdeblas ankaŭ en najbara Aŭstrio. Tradukas kaj parolas anoj de E-societo Maribor.

Jen nova rubriko en nia revuo, kiu respondas al longe sentata bezono pli regule aperigi novaĵojn pri la eldona kaj periodaĵa agado en Esperanto. Ĝin ni dediĉos al ĉio ajn, kio aperas presite en Esperanto, ŝajnas neordinare interesa, bona aŭ — foje — katastrofa kaj ne sufiĉe traktiĝas alirubrike. Krom aldoni komentariojn al “Laste aperis” (ĉar ja ne estas loko recenzi ĉion interesan), ĝi ekplenigos la mankon de regula “trarigardo de la gazetaro”. (Tamen ni neniel pretendas konkurenci kun la elstara samĝenra programo de la Pola Radio...)

● **Bildvortaro:** Post 24 jaroj da prilaborado aperis ĉe Esperanto Press, Balieboro, Ontario, Kanado, la Esperanta traduko de *Das Bildwörterbuch der deutschen Sprache*, alinome la Duden-vortaro. Terminoj por 25 000 objektoj el la ĉiutaga vivo estas troveblaj pere de 360 bildkompleksoj kaj tre detala 194-paĝa vortindekso. La 880-paĝa bindita verko haveblas de la eldonejo kontraŭ US\$48,00 plus \$4 sendokostoj. (Bonvolu ne mendi ĝin ĉe UEA ĝis la anonco en “Laste aperis”, ĉar nur tio signas ke ni havas sufiĉan stokon de iu titolo.)


● **Budapeŝta informilo:** Se oni devus elekti iun nacian E-revuon por anstataŭi *Esperanto*, eble BI estus la plej taŭga kandidato. Tiun laŭdon gajnus la internacieco kaj fidindeco de ĝia enhavo, aparte sub la relative nova ĉefredaktoro Imre Szabó, se ne jam subaĉetus nin la aprila ĉefartikolo, dediĉita al la okdekjariĝo de UEA. Vi aliaj redaktoroj, kiuj legas ĉi tiun rubrikon, bonvolu agi laŭe (kaj eble perlabori mencion!)... UEA meritas tion!

● **Edistudio:** La marta librokatalogo de la konata itala E-eldonejo (CP 213, I-56100 Pisa) parolas pri “la plej granda privata eldonejo de la movado”. Nu, ni ne scias... laŭ nombro de E-eldonaĵoj en la pasinta jaro, Fonto konsiderinde superas ĝin. Ĉiukaze, ĝia estro Bruĉjo Kasini prezentas allogan liston de titoloj, inkluzive de *Itala antologio* (kiu survojis pli ol 50 jarojn) kaj escepte bonan kolekton de Esperantaj “popolkantoj” (Ĝanfranko, Le Puil, Marĉela, Suzana...). Kompreneble, ĉio haveblas ankaŭ pere de UEA.

● **Janton:** La franclingva libro *L'Espéranto* de Pierre Janton, unu el la plej bonaj informverkoj en nacia

lingvo, lastatempe aperis en la nederlanda ĉe la eldonejo Meulenhoff. Nederlanda Esperanto-Centro sukcesis tion atingi surbaze de dividita financa respondeco. Cetere, la Esperanta versio de la libro, kiun prizorgis UEA, ĵus eniris la presejon.

● **Kurzens:** Kvankam okcidente ankoraŭ haveblas la kanada reeldono de *Mia spektro* de Nikolai Kurzens (13,50 gld. ĉe la Libroservo), la urala literatura rondo ĉirkaŭ *Sezonoj* (*Esperanto* 1987/p.111) aperigis mimean eldonon por sovetiaj bezonoj. La libreto enhavas la 59 originalajn poemojn kaj la kanadajn enkondukojn de Auld kaj Burgmeister. Aparte laŭdindas, ke oni petis (kaj ricevis) permeson de la kanada eldoninto Kriss Smilga.



● **Nemere:** Hungara E-Asocio, kiun onidire finance savis la eldono de “Libro de sekretoj” (en la hungara) de István Nemere, lastatempe lanĉis hungarajn tradukojn de *Sur kampo granita*, *La alta akvo* kaj *Serĉu mian sonĝon*. Jen nekutima lukso por E-eldonisto, antaŭvidi plurdekmilekzemplan vendon de ĉiu titolo...

● **Lingva:** Nova revuo ĉi-titola aperis pasintan decembron ĉe Paranaa E-Asocio, Brazilo. Ĝi ŝajnas la rezulto de kunlaboro inter brazila akademiano Geraldo Mattos kaj la eldonisto de *Fonto*, Gersi Alfredo Bays, kies eldona agado kreskas ĝis miriga nivelo. *Lingva* okupiĝas pri “esplorado de la lingvoj, ne specife Esperanto” — kvankam la unua numero, kiel eble decida pro la Jubilea Jaro, estas pure esperantologia (kaj sufiĉe interesa). Abonoj (US\$12) iru al: Fonto, CP 49, BR-89800 Chapecó SC, Brazilo; kontribuoj (nur sciencnivelaĵoj) al Geraldo Mattos, Rua Nicarágua 2141, BR-82500 Curitiba PR, Brazilo.

● **Slovakio:** *Esperantisto slovaka* trairis rimarkindan metamorfozon en la manoj de redaktoro Stano Marček, kiu transformis ĝin en informoplenan kaj belaspektan revuon. La informo pri abono maltrafis la novan Katalogon, sed aboni pere de UEA eblas kontraŭ 18,00 gld. al la konto aess-t.

● **TST:** *Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj*, la organo de la ĉina scienca E-asocio, ricevis oficialan sankcion pasintan novembron post dujara provaperado. Ĝi nun havas legantaron en pli ol 40 landoj, kaj en Japanio, Sovetunio kaj Irano oni tradukis el la revuo por nacilingvaj komunikiloj.

● **Ukrainio:** Speciala “presbulteno” okaze de la 70a datreveno de la Oktobra Revolucio, eldonita de la Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj, haveblas Esperante de la ukraina ASE-filio, Kiev-21, SU-252021.

● **Zamenhof:** Nova eldonejo en Brazilo, “Zamenhof Editores” (CP 1531, BR-74000 Goiânia GO), aperigis kiel sian unuan libron portugalan tradukon de la fama zamenhofa eseo: “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia”. Tradukis Itacir Luchtemberg, antaŭparolis Geraldo Mattos. La eldonejo planas aperigi ekde aprilo 1988 **dulingvan revuon pri ekonomiko** kaj rilataj aferoj, sub la redakto de Éber Vaz (profesoro pri ekonomiko ĉe la Katolika Universitato de Goiás). Por tio ili petas internacian kunlaboron de kompetentaj esperantistoj, kies kontribuoj aperos paralele en Esperanto kaj la portugala.

Poŝton por la ĝenerala sekretario de TEJO (Didi Weidmann) ekde nun sendu al Pf. 639, CH-8201 Schaffhausen, Svislando.

La adreso de Neil Salvesen en Manĉestro, Britio, ne plu validas. Lia **oficeja adreso** estas tiu de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam. Lia **hejma adreso** estas nun: C.P. Tielestr. 23B, 3023 TB Rotterdam. Tiu adreso validas same por la **eldonejo** Esperantaj Kajeroj.

Fotokopion de korespondadoj kun prof. Lapenna vi povos ricevi kontraŭ pago de 5 internaciaj respondkuponoj de d-ro W.A. Verloren van Themaat, Volkerakstraat 38-I, 1078 XT Amsterdam, Nederlando.

S-ino Karla Olsson (Ystad, Svedujo) translokiĝis al nova adreso: Bellevue K.4., S-27100 Ystad, Svedujo.

Nova adreso de Robert Victor Ebenau: Spoorstraat 62, 5705 JH Helmond, Nederlando. Tel. 04920-42402.

Populara, jubilea kantokasedo: "Dinjes: AL VENKO!" Kontaktu libroservojn!

Urĝe serĉas la libron de Paul Neergaard *Atakoj kontraŭ ĝardenplentoj* Wolfgang Bohr, Schlossstr. 22c, D-6736 Edesheim, FRG.

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la aperigo de anoncetoj. Por la tarifo anoncoj, bv. rigardi la kolofonon.

Dum la semajno de la Universala Kongreso (1988 07 23-30), la Londa Esperanto-Centro estos fermita. Bonvolu do ne altelefoni tiam, nek atendu pritraktadon de mendoj k.s. Antaŭdankon!

Adresŝanĝo: Mia filino, Sara Su Jones, dum la lerneja jaro (sept.-junio) estas ĉe: Box 547, Phillips Academy, Andover, Mass. 01810,

Usono. Nia nova familia adreso estas: 5048 N. Marine Dr., Apt. D-6, Chicago, IL 60640, Usono. **R. Kent Jones.**

S-ro Wang Hong, Hunan Xinhua Yinshua Yichang, CHANGSHA, Hunan (Ĉinio) deziras interŝanĝi Esperantajn pm, gm, insignojn k.s.

Tanzanio: Charles K. Hiza informas al ĉiuj siaj korespondantoj, ke li devas servi en la armeo ĝis julio 1989 kaj ne povos korespondi.

Filologoj bv. kotizi por 1988 al Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Filologoj (7 gld. al UEA-konto iuef-y). La organo *Filologo* aperas senpage por membroj. Eblas pagi ankaŭ al la peranto R. Moerbeek, poŝtbankkonto 1156545, Arnhem; adr. Bajonetstr. 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando.

Amikoj de ĉinaj esperantistoj: Via subteno per UEA-konto arce-k helpas sendi librojn k.s. al ĉinaj aktivuloj! Kor. adr.: s-ino Nora Reinders, Zwaansmeerstr. 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando.

"Stafeto"-serio prezentas:

Kazinski venas tro malfrue

Deck Dorval

Kial stabilanima kaj persistema viro, sukcesa inĝeniero farus murdon? Kaj, se li decidus fari ĝin, ĉu li estos sufiĉe inĝenia, ĉu li ekzakte kalkulos siajn ŝancojn, elektos la rimedojn kaj zorge kaŝos la spurojn por fari senmankan murdon, kaj tiel trompos la famkonatan inspektoron Ksaverio Kant?

Kazinski venas tro malfrue 176 p., 445 bfr/23,40 gld. + sendokostoj. Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS (Svislando)

atendas vin la tutan jaron. Agrabla esperanto-vivo, manĝoj, komfortaj ĉambroj, sana vivo en la montaro.

La venontaj esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj okazos la ĉi-sekvajn semajnojn: 20-25 junio, ĉiusemajne ekde 18 julio ĝis 20 aŭgusto, 19-24 septembro, 24-29 oktobro, 21-26 novembro ktp.

Aliaj aranĝoj: 25-26 junio: Hipnoto, sugestio, sofrologio kaj similaj fenomenoj. Instruos C. Piron. 29 junio-13 julio: 1-a Intensiva pedagogia-metodika kurso organizita de UEA-ILEI. Instruos I. Szanser, S. MacGill kaj C. Gacond. 18-23 julio: Legindaj libroj verkitaj inter la mondmilitoj. Instruos E. Borsboom. 18-30 julio: Esperanto-feriado por infanoj kaj familioj. Gvidantoj: C. Gacond, A. Clabaut, T. Chmielik. 25-30 julio: Lertiĝo en la tradukarto, el la franca. Instruos G. Lagrange. 8-13 aŭgusto: Grabowski kaj Mickiewicz. Instruos T. Chmielik. 15-20 aŭgusto: La Tragedio de l' Homo de Madach, spegulo de la evoluo de esperanto. Instruos G. Silfer. Ktp. **Petu la detalan informilon.**

ĈU LA HOMARO TRAVIVOS LA NUKLEAN EPOKON?

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.

Kontakto — la dumonata revuo de TEJO kaj UEA, parte facillingva — bezonas vian kunlaboron. Verku ion pri:

- junularaj aferoj
- la vivo de iu fama (aŭ tute ne fama) persono
- alia interesa temo
- iu profesio
- muziko
- amo kaj amikeco
- interesa loko
- aŭ simple sendu mallongan anekdoton...

La artikolo ne estu tro faka, do komprenebla por iu ajn. La lingvaĵo devas esti korekta. Sendu vian artikolon al la redaktanto de *Kontakto*: Leif Nordens storm, Lilla Nygatan 3B, S-96132 Boden, Svedio.

Fokuso

*Kvaronjara
popularscienca
magazino*

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario

"En fora lando..."

14 originalaj esperanto-kantoj



kantas Ramona van Dalsem
akompanas Sento Oriental'

Akompanas kaj kunkantas Jan O. de Kat.

Prezo (kasedo plus tekstoj): 27,00 gld. plus sendokostoj ĉe la Libroservo de UEA. Ankaŭ mendeblas ĉe Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstr. 172, Den Haag, Nederlando (ĉiuj rajtoj rezervitaj).

Persone



lanovakaseDODElarokgruPOPersONENomiĜASSesdekd
uminutOJKAJjentenasdekdukanTOJNORlginalevERKIT
ajNENEsperanTOMETalrokodiZKOBLusorePOKAJĴazoe
nmalkaĵolAMIKsoĉiukonsciAMOVadanomendUĜINTUjk
romesENKROmapagoviricEVOSĈArmanlibreTONKUnĉiu
jteksTOJKAJbelAJDESEgnetojsvingaSSimplesvinga
s

Prezo: 70 SEK (inkl. sendokoston). Pagu al pĝk 424 03 96-4, Borje Lund, Skebokvarnsv. 45, S-124 33 Bandhagen, Svedio.

Se vi aĉetas 10 aŭ pli ni sendos fakturon laŭ ĉi prezoj: **10-19** po 54 SEK plus afranko; **20 aŭ pli** po 48 SEK plus afranko.

"Stafeto"-serio prezentas:

Sub la signo de socia muzo

Antologio de poemoj kaj eseoj

William Auld kaj Stefan Maul (red.)

Pli ol 50 poetoj festis la centjarigon de Esperanto pere de tiu ĉi antologio. Siajn kreivajn esperantajn kapablojn ili uzis: rezultis antologio komprenebla, kvankam poezia, internacie.

Sub la signo de socia muzo 123 p., 425 bfr./24 gld. + sendokostoj.
Mendu rekte ĉe Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140-B-2000 Antwerpen, Belgio aŭ ĉe la libroservo de UEA.

Socilingvistikaj aspektoj de la Internacia Lingvo

Ĉi tiu pli ol ducent-paĝa referaĵaro el la Tokia Simpozio en 1986 meritas la atenton de ĉiu, kiu iam pensis pri la lingva malsameco de Eŭropo kaj Azio. Ĝis kiu grado Esperanto reprezentas vere neŭtralan kaj praktikan solvon al tiu problemoj? Profesiaj lingvistoj kaj spertaj parolantoj de Esperanto prezentas elementan enkondukon en tiun fascinan esplorkampon.

Prezo: 27,00 gld. ĉe UEA; 1/3-a rabato ekde 3 ekz.

Nova baza informverko pri Esperanto:



La fenomeno Esperanto,
William Auld.

120p. 21cm.
Ilustrita.
ISBN 92-9017 037 9.

Roterdamo:
Universala Esperanto-Asocio,
1988.

En ok ĉapitroj el la plumo de elstara verkisto, de prezento de la monda lingvo-problemo tra priskriboj de la lingvaj ecoj, literaturo kaj parolkomunumo de Esperanto, *La fenomeno Esperanto* havigos al vi informojn kaj argumentojn, kiujn devus posedi ĉiu aktiva movadano.

Mendu de la Libroservo de UEA kontraŭ 18,00 gld. plus sendokostoj. **1/3-a rabato** ekde tri ekzempleroj.

Venu, promenu kaj festu kun ni!

Nijmegen vin invitas: la Antaŭkongresa

INTERNACIA KVARTAGA PROMENADO

kun dekmiloj el pli ol **30 landoj!**

Oni promenos tra la belegaj ĉirkaŭaĵoj de Nijmegen: arbaroj, polderoj, montetoj kaj ĉarmaj vilaĝoj. Krom tio okazos en la urbo

LA SOMERFESTOJ:

folkloro, dancoj, festa bazaro, subĉielaj terasaj trinkejoj en la malnova urbocentro.

Pliaj informoj, aliĝiloj, faldfolioj kun regularo, kondiĉoj, kostoj kaj ĝeneralaĵoj estas haveblaj ĉe **Kees Ruig** (KvK), Pf. 38200, NL-6503 AE Nijmegen.